


INFORM. BIBLIOGRAF.

OOMOTO INTERNACIA




1934

Aŭgusto

Oomoto Centra Oficejo

Kameoka Kloto-hu Japanujo



Kvintesenco de OOMOTO

Deveno kaj Celo: La vorto «Oomoto» signifas Fundamenton. La Fundamenta (aŭ Centra) Dio, Kreinto de la Universo, aperis en la sankta loko Ajabe (Japanujo) en la jaro 1892 kaj deklaris pere de Sinjorino *Nao Deguĉi* Sian planon por la reformo de la Mondo. Ni nomas Sinjorinon Nao Deguĉi la «Fondintino» de Oomoto. La dia Reformplano konsistas en la ekstarigo de pli perfekta mondo, verdire la ĉielregno baldaŭ venos sur la Teron. Oomoto-Movado fervore laboradas por la baldaŭa efektivigo de la Dia Plano.

Nuna Stato de Oomoto: Post la ĉieliro de la Fondintino, nia movado daŭrigis sian agadon sub la aŭtoritata gvidado de Majstro Onisabro Deguĉi, adoptita filo de la Fondintino. Li estas eksterordinara homo, vera geniulo, eminenta en diversaj artoj kaj scioj. La nuna mondo baraktas meze de ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj aliaj malsanoj. Ni firme kredas, ke nia spirita Gvidanto estas la de Dio destinita Homo, sole kapabla piloti la ŝipon de la Homaro el inter la rifoj de hodiaŭo al la paca haveno de morgaŭo.

La Centro de Oomoto sin lokas en Ajabe, la Administrejo en Kameoka (Japanujo). Lokaj Centroj estas en Mukdeno kaj San Paŭlo, kaj pli ol 1,800 filioj ekzistas ne nur en Japanujo sed tra la mondo. Krom pluraj japanlingvaj organoj, monata gazeto «OOMOTO INTERNACIA» aperas en Kameoka. Nia Doktrino estas tolerema: ni unuigas kun Orientaj potencaj spiritmo-

vadoj kiel Tao-Yuan kaj Universala Ruĝsvastika Asocio; ni ankaŭ kunlaboras kun pluraj spiritaj movadoj — Tsaili-Hui, T'uch-Hui, Anching-Chao, Lamaismo en la Oriento kaj Blanka Frataro en la Okcidento. Ni ankaŭ fondis Universalan Homaman Asocion kaj Ligon de Religioj, kiuj bone laboras por la mondopaco. Ni vokas al ĉiuj tutmondaj gesamideanoj je komuna kunlaborado por pli bona kaj pli bela estonteco.

Maksimoj:

1. Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respegulas la *Korpon de Dio*.
2. Konsideru la seneraran funkciadon de la Universo kaj rekonu la *Forton de Dio*.
3. Konsideru la koron de la vivantaĵoj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la *Animo de Dio*.

Ĉefinstruo:

Dio estas spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuigas Dio kaj homo, tie ekestiĝas senlimaj fortoj kaj aŭtoritateco.

Devizoj:

1. Harmonio inter Dio kaj homaro.
2. Instruo pri Dia Vero.
3. Fundamenta moralo.
4. Sankta karaktero de la misio.

Principoj:

1. Pureco de animo kaj korpo.
2. Unuigo inter klasoj de la socio.
3. Optimismo pri la aranĝo de Dio.
4. Progreso por la socia plibonigo.

Foto sur la Kovrilo: «Miroku-den», ĉefa kaj granda preĝejo en Oomoto-Teritorio de Ajabe. Sur la malantaŭa monteto «Curujama» staras la domo de la Majstro, nomata «Kjŭten-kaku».

Supra foto: Parto de Oomoto-Teritorio, Kameoka.

OOMOTO INTERNACIA

MONATA ORGANO. DE OOMOTO-MOVADO KAJ DE UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Jaro 10

Aŭgusto 1934

N-ro 8 (108)

Ĉefredaktoro: Koogecu NIŠIMURA.

Redaktoro: Jozefo MAJOR.

Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto.

Pri kotizoj ktp. legu lastan paĝon.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Mene Tekel

— Koogecu Nišimura —

Ni estas esperantistoj kaj ankaŭ adeptoj de l' homaranismo. Internaciismo estas do nia devizo. En Japanujo, nur antaŭ 80 jaroj regis la feŭdala sistemo, en kiu grand-sinjoroj batalis unu kontraŭ la aliaj. Sed eĉ en tiu ĉi lando malaperis la antikva reĝimo, cedante lokon al moderna civilizo. Estas al ni tamen nekompreneble, ke la homaro ne povas vivi trankvile post la disfalo de la muroj de l' feŭdalismo: ŝajnas eĉ ke oni volas altigi novajn murojn anstataŭ la malnovaj . . . En la tuta okcidento, kiu cetere fieras pri sia civilizacio, *leviĝas nacio kontraŭ nacio, kaj regno kontraŭ regno*. Ĝuste laŭ la Biblia profetaĵo. Oomoto vidas tamen pli malproksimen ol la nuno. En la fono, malantaŭ la turmentoj de l' akuŝado, aperas al niaj animaj okuloj la konturoj de l' morgaŭa mondo, pli belaj ol la urboj de l' fabeloj . . .

Kiel multaj el niaj legantoj jam scias, en la Sankta Revelacio, la Fondintino de Oomoto donas profetaĵojn, kiuj ĝisnun senescepte plenumiĝis. La eksiĝo de Japanujo el la Ligo de Nacioj estas tie antaŭdirita, ekzemple, tiamaniere: «La tuta mondo unuani-me atakos Japanujon.» Oni komprenos do kial ĉiuj Oomotanoj tiel alte respektas la Sank-

tajn Skribojn de l' Fondintino. Tiu «Oomoto-Biblio» antaŭdiras ĉiujn timigajn problemojn de l' proksima estonteco. Jen ekzemple, ĉu la sekva frazo ne estas frapege aktuala? «*Mi, la prapatra Dio, kolektos ĉiujn batalŝipojn en la Pacifiko kaj detruos ilin.*» Ĉu tio ne estas fatala konsekvenco de l' Mararmea Konferenco de la venonta jaro, eventuale malsukcesa?

Kompreneble, se la mondo lastminute eĉ konvertiĝos, la Dia puno ŝanĝiĝos je beno. Tial ni, Oomotanoj, konvinkitaj pri la seriozega graveco de l' profetaĵoj, luktas per nia tuta forto kontraŭ la satano, por la *savo de l' mondo*. Ni esperas, ke tiu ĉi motivigo permesos al la mokemaj sprituloj kiuj «desupre» juĝas nin, formi al si pli ĝustan ideon pri la mensostato de sinceraj Oomotanoj. Nia laboro do estas esence altruisma. Ni ne zorgas pri ni mem, ĉar ni estas sub la protekto de Majstro O. Deguĉi, enkorpiganta la dian Spiriton. Sed nia koro tremas pro la homoj, kiujn nia voĉo ne ankoraŭ povis atingi kaj ankaŭ por tiuj, kiuj *ne volas* aŭdi. Ili legu *la averton sur la muro!*

Pri la signifo de **Mene Tekel** . . . vidu en la malnova Testamento (Danielo).

El la Sankta Skribo

La popoloj de la tuta mondo, pentu je la pekaj! La mondo fariĝos tute nova je ĉio. Estas tia loko, kie la tero leviĝos, ankaŭ tia, kie aperos maro pro malleviĝo de l' tero.

Maljusteco kaj malegaleco ne povas reĝi eterne sur la tero. Mi ŝanĝos la mondon en tute perfektan kaj senfinan Regnon de Dio, kie la homoj de altaj kaj malaltaj klasoj egale ĝuos eternan feliĉon en plena konkordo. (skribita en 1892)

Vortoj de Majstro O. Deguĉi



Etiko kaj Religio

Denature ĉiu homo havas konscion pri sia konduto aŭ parolo. Ja eĉ kato sentas skrupulon kiam ĝi ŝteltrinkas porinfanan lakton. Tamen raton ĝi manĝas fiere antaŭ sia mastro. Kiam hundo ĉaskaptis apiron, ĝi alportas ĝin al sia mastro svingante sian voston. Sed kiam ĝi ŝtelis kokinon, ĝi forprenas ĝin en arbaron kun vosto envolvita, kaj tie ĝi manĝas sekrete.

Oni instruas al homoj, ke ili ne ŝtelu, ne koleru, ne adultu ktp. Sed tia instruo kvazaŭ traktas homojn malpli ĝentile ol bestojn. Ĝi estas nenio alia ol banala etiko kiun oni instruas en lernejoj. Estas tamen strange, ĉar multaj kun ĝoja ekstazo aŭskultas predikon pri tiu etiko. Ili erare prenas etikon por religio. La idealo aŭ celo de religio estas: *doni pacon kaj feliĉon al ĉiuj homoj sur la tero per anima trankvileco kaj aplombo*. Oni ankaŭ diras, ke la homaro devas suferi, ĉar ĝia prapatro manĝis la malpermesitan frukton, kaj, ke Kristo elaçetis la pekon per sia morto sur kruco por savi la suferantan homaron. Kia sensenca hipotezo! Tio estas tiel sensenca kvazaŭ oni pardonpetas pagante al iu monon kun rento kontraŭ falsa pruntatesto kaj kredante ke la prapatro prunteprenis la monon! Eĉ la hodiaŭa leĝo ne rajtas puni la infanon, se lia patro krimis. Kial Dio, plena de Amo kaj Kompato punus la

postularon de Adamo kaj Eva?! Se Li punus, Li ne estus Dio, sed diablo. Mi ne komprenas kial la tielnomataj «modernuloj» ankoraŭ kuitas al tia malvera instruo. Kriminala leĝo estas eĉ pli logika kaj konsekvenca ol tia mistifika instruo. Ĉu vi estas konsente preta pagi monon kun rento kontraŭ pruntatesto pri kies aŭtentikeco vi ne estas certa? Kiu konsentus?! Ne ekzistas tia senkompata Dio, kiu punus la postularon pro la peko kiun faris la prapatro. La vera instruo de kristanismo neniam instruis en la komenco tian absurdon. Nur poste oni artefaris tian malkonsekvencaĵon. Se oni volus praktiki kaj konduki perfekte laŭ diversaj *Komandoj*, oni ne povus eĉ vivteni sin.

Vivo de Pentofaro

Se homo havas pekojn, li povas forigi ilin el sia koro kaj ne bezonas ilin konfesi al aliaj personoj. Se li konfesas pri sia peko private aŭ publike, li blasfemas Dion kaj malrespektas sin mem, *ĉar homo estas fragmento de Dio*. Cetere, oni neniam povas konfesi la fundon de sia koro, kaj pentofara vivo en la vera senco de l' vorto estas ne praktikebla.

La vivo de pentofaro estas ruza preteksto dank' al kiu hipokrituloj ŝajnigas sin piuloj kaj afektas noblan karakteron por montri sin kvazaŭ sanktuloj antaŭ la publiko. Tamen ilia konfeso ĉiam estas limigata. Neniu povas konfesi la fundon de sia koro. Neniam konfeson preferu al duona konfeso! Homoj nur reformu sian koron, forpelu kaj forgesu siajn pekojn -- tio sufiĉas. Kial oni bezonus longe memori pri siaj pasintaj eraroj! Por kio utilis?! Neniu povas regajni la pasintan tempon. Same, homoj ne povas antaŭspozici okazajn post kelkaj sekundoj. Ili ne povas scii, ĉu la

morto embuskos ilin en la sekva minuto. Antaŭzorgo pri estonto estas same sensenca kiel ĉagreno pri pasinto. Nur *la nuno* estas je la dispono de homoj. Nur en la nuna momento ili povas pensi kaj agi laŭ sia plaĉo. Pensu bonon en la nuno, parolu bonon en la nuno kaj faru bonon en la nuno — kaj ĉiam strebu al la universala homamo. La praktiko de tiu ĉi principo donos al ĉiu feliĉon kaj pacon.

Katastrofo kaj Homaj Aferoj

Preskaŭ ĉiuj el la nuntempuloj pensas, ke inter katastrofo kaj homaj aferoj ekzistas nenia rilato. Sed se malboniĝas la spirito de la homaro, tio naskas miasmon sur la tuta tero, malpurigas la universon, infektas la atmosferon kaj malordigas la aeron; konsekvence estiĝas diversaj katastrofoj.

Inter la homoj kaj katastrofo kuŝas tre ĉintima rilato: ĉar la homo estas la resuma skizo de la universo, malboniĝo de lia spirito rilatas delikate kun la Tuto, kiel ekzemple, la tuta horloĝo jam ne funkcias, se eĉ eta risorto difektiĝas. Kaj tial Dio admonas en la Sankta Skribo de Oomoto:

— «La homoj, kiuj estas faritaj en dia formo kaj devas plenumi gravan laboron anstataŭ Dio, plej multe reformu kaj rekonstruu sian koron en dian, kiel eble plej baldaŭ.»

Kun natura doto la homo havas la mision regadi la universon anstataŭante Dion, kiu estas Spirito enhavata en ĉio de la universo. Pri tio la Sankta Skribo diras:

— «Neniu estas pli altvalora kaj nobla ol la homo. Li havas la plej gravan mision en la mondo.»

Estas do natura rezultato, ke okazas diversaj katastrofoj sur la tero, se la homo, anstataŭante de Dio, pro malpuriĝo de la spirito forgesas sian gravan mision kaj nur kun egoisma agado ignoras la favoron de Dio.

Kompreneble, kun nesondeble granda amo Dio protektas eĉ insektojn, kiel siajn plej

amatajn infanojn, kaj Lia unusola granda deziro estas ja tio, ke la homoj, bestoj, vegetaĵoj kaj ĉiuj aliaj estaĵoj elkresku libere kaj daŭrigu por ĉiam prosperan vivon.

Oni devas bone mediti la sekvan frazon el la Sankta Skribo:

— «Ne plendu al Dio. Dia koro estas plenplena de forta deziro savi la homojn kaj ĉiujn aliajn kreitaĵojn kiel eble plej multe. Konjektu la Dian koron kaj tuj pentu la homo, estro de la estaĵoj. Dio rapidas senpacience, kaj jam atentigis ĝis supersufiĉo.»



Japanaj daŭcistinoj en bela «kimono» kaj «obi» (zono).

Universala Homama Asocio



*Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen senfine!*

Publika Letero

H. L. Follin, Parizo.

Radackia noto: Ni ricevis la sekvan leteron de s-ro H. L. Follin, iniciatinto de la granda kaj serioza internacia movado «Cosmométapolis». Kiel oni vidos el la letero, s-ro Follin komprenas nian lingvon kaj li estas leganto de nia gazeto. Ni tre ĝojas pro tia sukceso de nia propagando, kiun ni entreprenis ĉe li antaŭ jaroj en Parizo kaj esperas, ke nia lingvo baldaŭ fariĝos la oficiala por la internacia asocio «Cosmométapolis». Tiuokaze oni bezonas ian taŭgan kaj internacian nomon kies senco estas komprenebla sen kono de klasika lingvistiko...

* * *

*Honfleur (Francujo),
la 26an de Marto, 1934.*

Kara Amiko Nišimura,

Mi legis kun granda intereso, sed ne sen iom da melankolia miro, vian ĉi-monatan artikolon «La mondo kontraŭ Japanujo».

Malproksime estas de mi la ideo aliĝi al la malamika grupo de l' politikaj nacioj kontraŭ Japanujo, koncerne la nacian aŭ la internacian politikon de via lando. Malproksime estas de mi la ideo miskompreni la grandecon de l' japana popolo aŭ ĝian civilizacion. Mi estas certa eĉ, ke en Ja-

panujo la antikvaj virtoj harmonie miksiĝantaj kun la modernaĵoj estas pli nombraj ol la antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj postrestantaj kiuj tendencas kontraŭ la progreson. Mi estas certa, ke tiu ĉi popolo plenumos valoran taskon en la universala civilizacio.

Sed popolo kaj nacio estas du malsamaj konceptoj.

La unua estas la *vivo*, la alia nur la *potenco*. Do ŝajnas al mi, ke ne estas la rolo de fervora servanto de l' *universala homaro* fariĝi defendanto de iu *speciala potenco*, eĉ se tiu potenco estas tiu de l' popolo, al kiu li apartenas laŭ naskiĝo kaj tiu de l' patrujo al kiu li estas alligita.

Estas eble, ke la japana milita interveno en Manĉurio venigis pli da ordo, paco kaj libero en tiu lando ol estis dum la rego de l' ĉina politika anarĥio aŭ eĉ pli ol povus certigi la ago kaj la politika konkurenco de l' eŭropaj kaj amerikaj nacioj. Mi eĉ konsentas, ke tio estas versaĵna.

Sed tiu interveno restas tamen manifestiĝo de l' kredo pri la legitima suvereneco de l' *forto*, kiu povas ĉiam pretendi ke ĝi servas la naturan rajton, sed, ĝuste ĉar ĝi estas la suverena forto, neniam ĝi povas pruvi la legitimecon de sia pretendo.

Estas malsame, se la japana registaro donus ekzemplon al la aliaj registaroj kliniĝante antaŭ la principoj «Kosmometa-politikaj» kiuj korespondas en la socia kampo al la *principoj de Oomoto* en la anima kampo; kaj se la japana registaro apogus sin

sur la universala tuthomara publika opinio, reprezentata de la spiritalaj Potencoj tia kia ni devas fariĝi (kaj kia ni fariĝos tuj kiam iu registaro, granda aŭ malgranda rekonos nin), la misio de l' malfermo al Manĉurio al la civilizo kaj tiu de l' respektigo al ordo en tiu lando, *ne je la profito de iu nacio*, sed *je tiu de l' tuta homaro*, estus samtempe la triumfo de l' aspiroj kiuj estas al ni komunaj.

Mi do vokas al vi, kara amiko Niŝimura, ke vi meditu tiujn ĉi ideojn kaj ke vi submetu ilin al la medito de via majstro Onisabro Deguĉi.

Esperante, ke li kaj vi rekonos la gravecon de la temo kaj ke vi publikigos ĝin en Oomoto Internacia, mi certigas vin pri la fideleco de miaj frataj sentoj.

H. L. Follin

* * *

Respondo al Sinjoro Follin

Kameoka, la 13an de Junio, 1934.

Altestimata kaj Kara Amiko,

Kun elkora danko mi legis vian afablan leteron, ne nur ĉar ĝi venas de tia altvalora amiko de nia movado kia vi estas sed ankaŭ, kaj ĉefe, ĉar ĝi estas la sincera opiniesprimo de serioza leganto de Oomoto Internacia pri temo ĝeneral-interesa.

La esenco de via letero, se mi ne erare interpretas ĝin, estas la demando: Kial Oomoto subtenas la politikon de l' japana registaro rilate al Manĉurio? La respondo, kiun ni povas doni al tiu ĉi malkaŝa demando, estas simpla: *pro amo al justeco!*

La fakto, ke Japanujo estas mia patrujo kaj tiu de l' plejparto de Oomotanoj, neniel influis ĉe la formo de l' supra opinio.

El la historio de Oomoto oni klare vidas ke la doktrino de tiu ĉi spirita movado ne ĉiam harmonias kun la reganta politika reĝimo de Japanujo. Nur antaŭ malmultaj jaroj la plej sankta templo kaj la estiminda tombo de l' Fondintino en Ajabe estis,


detruitaj de l' batoj de l' japanaj registaraj oficistoj... Se la politiko de l' registaro — ĉu en Japanujo, ĉu alilande — denove venus en konflikton kun la principoj de Oomoto, ĉiu sincera Oomotano preferus morti kiel martiro ol hipokrite submeti sin al la *potenco* de l' ŝtato. Ĉi tiu konstato sufiĉe klare montros, ke ni klare diferencigas inter *popolo* kaj *nacio*, kiel vi mem faras.

Sinjoro Follin! Vi certe ne ignoras la ekziston de l' manĉuoj, la popolo kiu loĝas en Manĉurio. Tiu popolo suferis sub la kruela rego de iu registaro, kies sola aŭtoritato baziĝis sur *forto*. Ĉu tiu stato estis preferinda al la nuna? Kiam *Forto* estas en servo de *Justo*? Vi diros, ke *forto* ĉiam malpravas; ni diras, ke ĝi pravas kiam ĝi subtenas justecon. Eble en la estonto forto (perforto) estos nenecesa — dank' al la ĝeneraliĝo de l' homaranismaj principoj — sed en la nuna tempo forto en servo de justeco estas ege necesa. Oni ne povas postuli, ke la japana registaro sola, pionire aliĝu al la doktrino de «Cosmométapolis»; tro da ŝtatoj troviĝas ĉirkaŭe kiuj profitus el la foresto de l' japana armeo en Manĉurio...

Sinjoro Follin! La «principo de l' malfermita pordo de Manĉurio», ĉu vi estas ĝia partiano? Ĝis nun la registaro de Manĉukuo ĝin severe respektis. Tiu principo permesas al nacioj ajnaj negoci en Maĉukuo sen iuj doganaj malhelpoj. Ĉu tia libereco troviĝas ie ajn aliloke? Ĉu ĝi ne similas al la principoj de «Cosmométapolis»? Estas nur dezirinde, ke la eŭropaj registaroj donus la saman rajton al ĉinaj kaj japanaj negocistoj kiun ili ĝuas en Ĉinujo kaj Japanujo... Kiom ajn ni estas homaranoj, ni ne kredas, ke tia stato eterne daŭros. Ĉu la pordo malfermiĝos en la okcidento, aŭ ĝi fermiĝos ankaŭ en la oriento. Ĉu vi estas preta, sinjoro Follin, labori por la malfermo de tiu pordo *ĉe vi*? Niaflanke ni klopodos teni la pardonon tia kia ĝi estas nun, en nia mondparto. Ĉiu en sia sfero klopodu por la sukcesigo de

Mikado

— Jozefo Major —



«Nijuu-baŝi» (duobla ponto).

La enirejo al la Imperiestra Palaco.

Mikado estas la titolo de l' japana Imperiestro . . . laŭ la Plena Vortaro. La japanoj mem nomas Lin Tennô Heika (=ĉiela Imperiestro) kaj «Emperor» — en oficialaj, anglaj tekstoj. Kvankam la vorto «Mikado» estas antikve-japana, neniu ĝin uzas plu hodiaŭ.

La antikveco de la japana Imperia Familio estas unika en la mondo. La unua paragrafo de la konstitucio diras: «La Japana Imperio estos regata kaj administrata de generacio Imperiestra seninterrompa por tempo eterna.» Ĉiuokaze, la origino de la Imperia Familio perdiĝas en la nuboj de l' griza pasinteco. Laŭ la nacia historio, post senfinaj ĉielaj generacioj, la unua surtera Imperiestro estis Ĝimmu Tennô (660 A. K.). Sekve, la aĝo de l' Imperiestra Familio (tera) estas 2600 jaroj.

Oni devas scii, ke la Imperiestro estas ne nur Ĉefo de l' ŝtato sed ankaŭ Tiu de l' Ŝtatreligio — la Ŝintoismo. Laŭ la japana mitologio unuanime akceptata de l' tuta nacio, la Imperiestro estas eĉ vivanta dio. Oni do komprenos, ke la spiritoj de l' mortintaj (=ĉielirintaj) Imperiestroj estas *apoteozataj*. La plej eminentaj inter ili estas sendube Ĝimmu Tennô, la Fondinto de

l' Imperio kaj Meiji Tennô, la Renoviganto de la lando. Kiam la Imperiestro, aŭ iu membro de la reganta Familio, traveturas la stratojn de japana urbo, la popolo staras ambaŭflanke kaj silente kliniĝas je la alproksimiĝo de l' kaleŝo aŭ aŭtomobilo atendata. Tia sceno estas vere impresiga. Alia menciindaĵo tie ĉi estas, ke oni ne devas rigardi membron de l' Imperia Familio *de supre*. Oni do ne staru sur keston, ŝtonamason aŭ tegmenton, nek oni rigardu de fenestro la alvenon de altrangulo.

La fotografaĵo de l' Imperiestra Paro ornamas ĉiun japanan loĝejon — de l' palacoj ĝis la plej mizera budo de lignohakisto. La nomo de l' nuna reganta Imperiestro estas Hirohito sed oni ĝenerale nomas Lin simple «La Imperiestro»; en la historio oni konos Lin sub la nomo de Ŝooŭa-Tennô, laŭ la nomo de l' nuna «epoko» (Ŝooŭa). Ĉiu regperiodo estas nomata per speciala vorto. La nuna Imperiestro estas ankoraŭ juna; Li naskiĝis en 1911 kaj la Imperiestrino en 1913. La Imperiestra Paro havas tri filinojn kaj unu filon, kiu estas la Heredanto. La Imperiestro havas tri fratojn kaj la Familio konsistas krome el la vidvino de l' antaŭa Imperiestro kaj sufiĉe granda nombro da princoj kaj princinoj. La Imperia Palaco troviĝas kompreneble en Tokio kaj ĝia belega, japana nacia arkitekturo akre kontrastas al la banale kubisma «manko de stilo» de l' komerca kvartalo.

*

Japana Nacia Himno

«Regado Lia»

Daŭru longe Lia tron'
Ĝi eterne glora restos,
Ĝis el ŝton' kreskos jen
Forta roko por la ben' —
Verda ĝin musko vestos.

Japana Filozofio

— Michel Revon¹ —

(4)

Murô Kyusô

Murô Naokiyo naskiĝis en 1658 proksime al *Edo*^② kaj li frue distingiĝis per sia studemeco. Je la aĝo de 14 li eniris la servon de l' *daimio*^③ de *Kaga*. En tiu provinco li loĝadis en dometo duon-ruiniĝinta, kiun li baptis «Kolombejo»; ĉi tio klarigas lian mem-elektitan kromnomon «Kyusô». Lia daimio malkovrinta la inteligentecon de l' junulo, sendis lin al fama ĉinologo^④ en *Kioto*.^⑤ Post kiam Kyusô — kiel tiom multaj — perdis la duonon de sia vivo en vanaj studoj, li decidis serĉi praktikan saĝon en la doktrino de *Ĉu-Hi*. Ekde sia 40-a jaraĝo, li estis fidela ano de tiu skolo.^⑥ En 1711 *Kyusô* estis nomata profesoro de ĉinmaniera filozofio en *Edo*; li ankaŭ fariĝis konsilisto de l' *ŝoguna*^⑦ registaro ekde 1716. *Kyusô* instruadis do en *Edo* ĝis sia morto en 1734 kiam li havis 77 jarojn. La titolo de lia ĉefverko estas *Syundai Zatuwa*: ĉarma kolekto da Sokratecaj konversacioj inter la maljuna pensulo kaj liaj disĉiploj. La sekva fragmento estas elektita de tiu verko: ĝi montras la karakteron de l' aŭtoro kaj ankaŭ tiun de lia doktrino.

Okdekjarulo Plantis

En la epoko *Kan-ĉi*^⑧ la Ŝoguno ĉasadis per falko ĉirkaŭ *Janaka*. Li do marŝis perpiede kaj senintence eniris templon. Tiutempe iu bonzo de l' templo troviĝis en la ĝardeno kaj li greftis arbon. La sek-

vantaro de l' Ŝoguno ne ankoraŭ alvenis, nur du aŭ tri viroj akompanis lin. La bonzo eĉ ne sciis ke la alveninto estas alt-rangulo kaj neniel atentis lin. «Bonzo», diris la Ŝoguno — «Kion vi faras?» La maljuna bonzo, mirigita pro tia maniero, malvarme respondis.

«Mi greftas.» La Ŝoguno diris ridetante: «Estante tiel maljuna, vi ne scias, ĉu vi povos ĝisvivi la tagon kiam la greftita arbo portos fruktojn. Via laboro estas senutila!» «Kiu vi estas — respondis la bonzo — kaj kial vi diras tiajn frivolajn kaj supraĵajn vortojn? Pripensu nur! Mi greftas tiun ĉi arbon kaj ĝi portos fruktojn al mia postulo; iam densa arbaro donos ombbron al la preĝeja teritorio. Mi do laboras por la templo, ne por mi mem.»

La Ŝoguno admiris la sincerecon de l' bonzo kaj diris: «Viaj vortoj estas perfekte veraj.» Dum tiu ĉi tempo la sekvantaro de l' Ŝoguno alvenis kun la simboloj de l' Reganto. Tion vidante, la maljuna bonzo konsternita fuĝis al la fono de l' templo. Sed la Ŝoguno revokis lin kaj donis al li valorajn donacojn.

La Maljunulo^⑨ agas kiel tiu bonzo kiu greftis. Malgraŭ sia alta aĝo li volis profundigi en la antikvan scienccon dum sia vivo, instrui ĝin al la homoj kaj postlasi multajn verkojn. Se tiuj laboroj kapablas montri la veran Vojon, se ili helpas iamaniere sekvi tiun Vojon, la Maljunulo, kvankam mortinta, ĉiam vivos. Kiel iu jam diris^⑩: «eĉ se la karno neniĝas, restas la ostoj.» Jen mia deziro, mi ne laboras pro vanteco. Komprenu mian korstaton je via profito.

① Vidu O. I.: Aprilo, Majo, Junio 1934

② la nuna Tokio

③ japana feŭdala sinjoro

④ sciencisto pri Aferoj Ĉinaj

⑤ la antikva ĉefurbo de Japanujo

⑥ Ankaŭ Konfucio formis sian definitivan mondkomprenon je la aĝo de 40

⑦ Ŝoguno=la Reganto

⑧ 1624 — 1643

⑨ t. e. la filozofio, la aŭtoro

⑩ t. e. Lao-ĉe

Filozofio de l' Vivo

Parolado de Sinjoro Hidemaru Deguči



Materia kaj spirita formo estas ĉiam relativa. Analoge al apetito kaj manĝo ni havas aspiron kaj avidon por spirita nutraĵo. Ni havas digestan kaj sorban organaron kaj *tian*

ni havas ankaŭ spirite, (dank' al kio ni pli kaj pli inteligentiĝas). La fakto, ke ni havas nian patron, signifas, ke ni havas nian patron ankaŭ en la spirita mondo. Ankaŭ niajn gvidantojn kaj patronojn ni havas spirite kiel en la materia mondo. Korpe ni havas fortan oston kaj ungon kaj spirite ni havas fortan volon kaj kuraĝon. Nia korpo entenas nervan sistemon kaj vejnojn, do ankaŭ nia spirito havas *tiajn*. Ni povas marŝi sur la vojo, same do ankaŭ sur la spirita. Sur nia vizaĝo ni havas okulojn kaj ni havas ilin en la koro. Eĉ flar- kaj aŭd-organon ni havas en la spirita senco.

Suprajn ekzemplojn mi citis por montri, ke spirita kaj materiaj formoj estas ekzakte paralelaj. Ni devas marŝi ĝustan kaj veran vojon de l' vivo; ni ne devas vagi aŭ perdi la vojon al la celita loko. Jen la plej grava problemo de l' vivo.

Tro da manĝaĵo kaŭzas digestan inertecon aŭ lakson al la ventro. Tro da medikamento malbone efikas. Same, tro da memkontrolo, sindeteno kaj cetera mensa kulturo estas vanaj, des pli se ili estas asketaj. Por atingi unufojon elektitan kaj celitan lokon ni devas iri sur la ĝusta vojo. Ankaŭ en la spirita senco ni devas klopodi kaj peni por marŝi ĉiam sur bona vojo direkte al bona celo de nia vivo. Konstanta kaj forta aspiro al *bono* estas plej esenca kaj necesa por ĉiu homo. Kiu havas konstantan kaj

fortan aspiron al spirita progreso en sia vivo, pro skrupulo pri sia spirita stato, pli kaj pli direktiĝas al *bono*, ĉar lia koro inklina kaj senriproze strebas al ĝi. Mi ripetas, ke tiu ĉi vigla aspiro kaj strebo al «*bono*» estas la plej esenca por la homa vivo.

Vivo estas vivinda kiam ni havas *amata ĉevaleton*.* Ni klopodas por ĝin akiri. Sed la speco de amata ĉevaleto ŝanĝiĝas unu post alia. Suĉinfanoj pleje ŝatas lakton. Tio estas tuto. Infanoj ŝatas ludilojn kaj pupojn, kun kiuj ili amuziĝas kaj per kiuj ili malfermas antaŭ si amuzan mondon. Geknaboj ŝatas kanti kaj ludi kun siaj amikoj. Ludado, manĝado kaj dormado — jen preskaŭ ilia tuta vivo. Precipe dolĉajn kukojn ili ŝatas, ĉar ilia aĝo nature ilin postulas pro sponta bezono. Sed kiam ili pli kaj pli maturiĝas, ili ekŝatas aliseksulojn. Tio estas neevitebla kaj natura. Baldaŭ, tamen, ili atingos la aĝon kiam amafero ne tre interesas ilin. Ili nun deziras gajni monon. Ili klopodas akiri multan monon. Sed finfine ili demandos al si, kiu estas preferinda, ĉu mono aŭ feliĉo? La vera respondo al tiu ĉi demando devas esti: monto da mono neniom feliĉigas la homon en la vera senco de la vorto. Feliĉo kaj paco estas la plej bonaj por la vivo.

Amata ĉevaleto ŝanĝiĝas kiel mi jam diris. Do kio estas la finfino? Tio estas amo. La fina sopiro de homoj estas ja vivi en senĝena atmosfero kun amataj kaj gajaj amikoj, kiuj zorgas sin reciproke, sincere kaj frate. Amo — senkondiĉa mistera forto. Materio estas limigita. Kiel ajn homo volus fariĝi riĉa, li ne povos sin pli riĉigi ol tiu, kiu ekzemple akiris la tutan enhavon de la terglobo. Tamen, ĉu la vivo estos feliĉa kaj paca kiam oni estos akirinta la

*zamenhafa esprimo: preferata okupiĝo

Kiam la Majstro estis Socialisto kaj Ateisto...

En sia aŭtobiografio nia majstro O. Deguči skribas jene pri siaj junaj tagoj: (La Red.)

★

Tiutempe mi ankaŭ suferis penso-krizan periodon, kiu estas ne evitebla por junuloj. Kiam mi vidis aŭ aŭdis socian maljustecon kaj malkonsekvencon, en mi estiĝis radikala dubo pri la vivo. La ĉefa kaŭzo kiu ŝokis mian vivkoncepton, estis la morto de mia patro. Mi ĉiam kultis al Dio jam de 1' knabeco. Ĉar ĉiuj diversaj rimedoj pruviĝis vanaj por la longedaŭra malsano de mia patro, mi intencis min turni al Dio por Lia favoro kun la espero ke la malsanulo resaniĝu dank' al fervora Dikredo. Mi vizitis multajn preĝejojn unu post la alia, sed mi estis tute seniluziigita kiam mi trovis ilin plenaj de superstiĉoj. Intertempe malfeliĉa mia patro mortis. Mi perdis tutan esperon kaj kuraĝon. De tiu tempo mi fariĝis ateisto kaj evitis ĉiujn aferojn kiuj temas pri Dio aŭ religio.

La ekzisto de riĉuloj kaj malriĉuloj kaŭzis al mi ĉiam grandan enigmon. Mi ofte demandis al mi, ĉu lando, kapitalo kaj ĉiuj produkt-rimedoj ne estas la donaco donita de Dio por la feliĉo kaj ĝojo de la

tutan mondon por sia propraĵo? Tute ne! Ĉar avido kaj deziro de 1' homo ne konas finon, dum materio estas limigita. Ĉu la plej grandioza inteligentulo, nomata ekzemple «vivanta enciklopediulo» — ĉu li estos feliĉa kiam ekzemple malpaco regas en lia familio, lia infano malsanas kaj li estas malŝatata de aliaj homoj?!

Feliĉo kiun oni povas ĝui materie estas tre limigita. Feliĉo kiun oni povas ĝui spirite estas eterne senlima. Ĉiuj homoj pli-malpli frue ja devas alveni al tiu ĉi koncepto pri spirita feliĉo. Ne devas, sed ĉiuj nature alvenas al tiu ĉi vivkoncepto. La homo kiu atingis tiun ĉi koncepton plu ne povas sin apogi sur memfido, nek sur

tuta homaro? Tamen, bienuloj kaj kapitalistoj ilin akaparos kaj monopoligas al si kvazaŭ sian propraĵon. Ĉu ili do havas tian specialan meriton aŭ rajton? Kelkaj satmanĝas kaj sin vestas lukse, tute ne laborante kaj suferante, dum multaj el la homaro malsatas kaj tremas pro malvarmo. Ĉu mi lasu la mondon kia ĝi estas?

Religiaj instruoj predikas pri humana kaj filantropia doktrinoj, sed ankoraŭ ne sukcesas savi la mondon... nur donas iom da konsolo al nia koro, per imaga perspektivo de feliĉa postmorta vivo. Edukado ekipas nin per diversaj konoj kaj sci-oj, sed ne kapablas doni ian protektilon kontraŭ malsato kaj malvarmo. Leĝoj (elpensitaj) de homa penso laŭ plej malaltnivela kriterio pri moralo, punas homojn sed ne povas savi la suferantan homaron pozitive por ke ĝi vivu kiel surtera anĝelano. Militarmeo nur servas protekti iun aŭ alian nacion, sed ne servas por sekurigi la pacon doni la feliĉon al la tuta homaro. Doloro kaj malsato minacas la homaron — tia estas la mondŝtato. Ĉu tio estas vera, justa kaj humana? Tiu ĉi demando min turmentis dum longa tempo.

homa socio. Homaj saĝo kaj povo estas tre malgrandaj.

Konstatu tiun verecon el la fakto: la mondo neniom boniĝas dank' al homaj klopodoj, dank' al grandaj politikistoj kaj dank' al gravaj tutmondaj konferencoj! Tie ĉi homoj devas sin turni al superhoma forto, mistera lumo. La koro de 1' homoj nature inklinas al mistera Potenco kiam ili konstatis la vanecon de 1' homa klopodo. Kelkaj diras, ke religia sento ne estas ĝenerala kaj propraĵo de specialaj personoj. Tio estas erara. La fina aspiro kaj sopiro ne estas materia sed ja spirita. Aspiro kaj sopiro al Dio — tio estas natura por ĉiuj homoj.

Trad: T. Nakamura

De Kristanismo Al Oomoto

Mijako Karaŝima (f-ino), Tokio

Kio altiris plej forte mian koron al Oomoto, estis jenaj punktoj: Oomoto estas tute senpartia, kian oni nenie vidas en la religia kampo de la nuna epoko; kaj Oomoto ja havas superhoman kaj senekzemple grandan Instruanton, per kies gvidado ĝi laboradas senlace por sia celo t.e. efektiviĝi ĉielregnon surtere, jam rikoltante brilantan sukceson.

En *Holiness*-Preĝejo, kien mi iradis, oni kredas la revenon de Kristo, sed oni ne estas certa pri la tempo, kiam li aperos. Lin atendante oni nur preĝadas kun nebulo en la koro, kvazaŭ oni kaptus nubon. Mi avide deziris sciiĝi pri tiu grava tempo kaj klopodis ĉiamaniere: mi abonis gazeton «Ora Epoko», kiu estas eldonata de Toodai-ŝa (Lumturo-Societo) por komentarii la Bibliion; sed vane. Mi do rekte demandis kelkafoje al la societo pri mia demando. Tie ĉi oni kredas, ke Kristo jam revenis spirite, sed neniam revenos kun reala korpo.

Mi tute ĉagreniĝis, ĉar inter kristanoj, kies kredo estas bazita sur nur unusola Biblio, troviĝas diversaj opinioj pri Kristo. Sed mi konvinkiĝas pri la aŭtoritateco de la Biblio kaj iradis ĉiam ankoraŭ al la preĝejo.

Pastro de la preĝejo kaj miaj zorgantoj en tiu krédo, kelkafoje al mi proponis baptiĝi. Sed en mia koro kuŝis io, kio ne konsentis tion fari, kaj min trafis malagrabla ĉiufoje, kiam mi intencis baptiĝi. Mi pensis do, ke tio devenas de mia malbona korteniĝo, kaj mi, min kuraĝigante, faris preparon por baptado eĉ tri fojojn, sed tamen ĉiufoje mi malsukcesis pro ia nekontenteco, kiu de la komenco pendis nedegeliĝanta en mia koro.

La kaŭzo venis de tio, ke Kristanismo estas tre ekskluzivema, predikanta, ke oni ne devas viziti templojn de aliaj instruoj,

aŭ, ke oni povas saviĝi nur per ĝi, sed neniel per aliaj, kvankam ĝi instruas ĉiam, ke Dio estas unu sola. Tiu ĉi donis al mi neklarigeblan ian malagrablecon.

«Se oni ĉiam fiargumentas kiel vi, oni neniam povos posedi veran dikredon.» Al mi admonis la pastro. Ĉe denova pripenso, ke eble mia ideo estas malĝusta, mi decidis nepre baptiĝi en la venonta fojo.

Ĝuste en tiu tempo (en decembro de la lasta jaro) vizitis min iu junulo, kiu petis min aboni la ĵurnalon de Universala Homama Asocio. Ĉar nenio en tiu ĵurnalo altiris mian atenton, kiam antaŭe mi ĝin aĉetis, ĉi-foje mi simple rifuzis aboni. Sed pro fervora sintenado de tiu junulo mi estis devigata aĉeti ekzempleron. Li parolis al mi pri U.H.A. - kaj Oomoto-movadoj. Interalie min frapis liaj vortoj: «jam aperas granda Gvidanto de la mondo». Estas ja grava demando, se tio ĉi estas vera, sed ne povas okazi tia afero, mi pensis. Kaj tamen mi estis forte frapita de io granda en liaj vortoj; mi deziris unufojon esplori Oomoton kaj petis al li pruntedoni iun referencan libron pri la movado. La libro, kiun li donis al mi, estis «Rakontoj el la Spirita Mondo». Ĝin foliumante mi trovis la jenan poemon:

La amo Dia

Egale ludas rolon

En ĉiu vivo,

Dum inter si frivole

La homoj faras murojn.

Tio ĉi ja devas esti vera Koro de Dio, mi pensis. Dank' al tralegado al la tuta volumo de la Rakonto al mi tute klariĝis demandoj, kiuj ĝisnun restis nebulaj en mia koro. Kaj despli firme mi konvinkiĝis pri la grandeco de la movado, aŭskultante la junulon, kiu du tagojn poste denove min vizitis.

Kelkajn tagojn post tia granda ŝanĝiĝo de mia kredo, el *Holiness*-preĝejo venis du senditoj, kiuj diris al mi, ke nepre mi ricevu la baptadon postmorgaŭ. Mi respondis al ili:

«Dank' al Oomoto mi klare sciigis pri la vojo, kiun mi marŝos. Kaj mi ankaŭ kredas, ke en Oomoto jam aperis granda Savanto, kies Revenon ni entuziasme preĝadis ĝisnun. Mi tre dankas al vi por via granda bonkoreco, kiun vi montris al mi en gvidado al la kredo. Mi opinias, ke plenumi fortan deziron de la spirito estas konforme al Dia Koro. Havante ĝustan komprenon pri Dio, ni kunlaboru kiel antaŭe por starigi surteran ĉielregnon.»

Tion dirante mi rifuzis ricevi la baptadon. Unu el ili forte kontraŭstaris al mi:

«Vi estas ensorcita de diablo! ĉar Oomoto ne povas esti tia, kia vi kredas.»

Kaj li bonvolis eĉ preĝi por mi, dirante: «Ho Dio! Tiun ĉi kompatindan fraŭlinon,

katenugitan de diablo bonvolu favori per Via senlima amo kaj returnigi ŝin al nia instruo!»

Sed vidante mian neŝanceliĝeman firmecon, la alia diris:

«Por koni Dion oni devas agi laŭ la ordono de sia konscienco. Havante tian kordecidon, vi agu laŭ via maniero.»

Post tiuj vortoj ili foriris. En tiu tago mi fartis tre agrable kaj sentis fortecon ĉe la ventro, kian mi ne spertis antaŭe.*

Baldaŭ, en la lasta Januaro, mi vizitis la sanktan lokon Kameoka kaj ricevis unu semajnon da Oomoto-kurso. Mi estis profunde emociita de grandeco kaj vereco de la instruo. Kaj nun mi klopodas laŭpove por konigi Oomoton al eĉ unu persono pli multe.

* Aludo al la interrilato de l' homa nervaro kun la spiritaj fortoj de l' Universo (laŭ Oomoto-doktrino).
-- La Red.



La foto prezentas la riveron Kiso — La Japana Rejno, unu el la ok famaj pejzaĝoj de Japanujo. La loko certe meritas la nomon de la Nacia Parko.

Vi ne havas monon aboni? Varbu do kvar abonantojn kaj vi ricevos vian propran abonon senpage. Agu tuj!

OOMOTO INTERNACIA

La Granda Brokantisto (Pesimismo - Optimismo)

— Julio Baghy —



« . . . Mi tre bedaŭras, ke okaze de la dekjara jubileo de l' Esp. movado de Oomoto mi forgesis la esprimon de la simpatio. Mi ne kulpas. Mi vagadas en la mondo kaj azetoj tre malofte trafas min. Ĉiam mi retrovas ilin post reveno al la hejmo. Tamen mi pensas, ke la vortoj de la respekto kaj simpatio neniam malfruas kaj pro tio nun mi esprimas korajn bondezirojn al via movado, kiu sukcese sieĝas la homajn animojn por krei homan solidarecon, en kiu devos revelaci tiu spirito, kiun oni ĝenerale nomas Dio. Krome la Oomoto movado alportis novan rejimenton al la Esperantismo kaj sincer-korajn adeptojn al la Homaranismo. Tiamaniere Oomoto plenumis ne sole religian, sed ankaŭ kulturservojn por la ĝenerala plifortigo de la ideo. Kore mi deziras, ke via sindona laboro estu fruktodona kaj alportu la simpation merititan por vi. Mi deziras, ke la inspira

momento, en kiu via Majstro, la respektinda s-ro O. Deĝuĉi ekvidis la vastan horizonton de la Esp. movado, estu utila ankaŭ por viaj noblaj celoj. Mi deziras, ke la dua jubileo estu atentata kiel grava okazintaĵo ne sole por la Oomoto-Esperantistoj, sed ankaŭ por tiuj, kiuj flanke staras de ambaŭ movadoj kaj ne estas iliaj aktivaj batalantoj. *Belan estontecon!* »

Vesperigās. La Suno baldaŭ subiros por mi. Mallumo sternos noktomantelon sur min. Mia korpo ekripozos. Ĉu mia animo? . . . Mi ne scias, ĉu mi havas animon. Se ĝi ekzistas, mia animo restos sur la Tero por serĉi plu la vojon. Se ĝi ne ekzistas (estus vere bone!), la neniigo alportos perfektan pacon.

Mi laciĝis. Ripozon mi deziras.

Min ne interesas, kiom longe mi devos ankoraŭ migri. Maŝine mi movas min, sen timo mi rigardas al la sunsubiro. Mi ne havas emon por retrorigardi al la pasinteco. Mankas la forto por provizi min per novaj aspiroj. Mia almozula tornistro estas truple. Perdi la akiraĵon estus facile.

Mi ne deziras rememori pri tio, kio apartenis nur al mia individua ekzisto; nek batali mi deziras por tio, kio neniam povos esti atingita de mi: la estonteco. La ĉiutaga ĝemo vibras sur miaj lipoj. Ĝi formas solan frazon: «La Vivo estas io stulta.»

Ni naskiĝas . . . Ni ne scias pro kaj por kio. Ni ekzistas nekonante la kialon. Fine ni ekripozas neestante certaj pri nova mate-niĝo. Ni plenigas la malplenecon per alternantaj sensencaj sencoj. Ni konstruas sur teorioj, ni batalas kaj mortas por belsonaj vortoj. Ĉion ĉi ni faras por doni ian fikтивan kernon al la Vivo, kiu estas io stulta.

Dolore estas scii, ke ni scias nenion. Jes, nenion! Ĉe la vojfino saĝulo kaj blinda kredanto ĉiam konsciiĝas pri tio ĉi. Ili ambaŭ migris sur la vojo de eraroj, sed konfesi tion, ili ne kuraĝas. La saĝulo pro vanteco silentas; la lipojn de kredulo sigelas la timo pri la sugestita transtomba fikтивajo.

La homa vivo koncipiĝas en mensogo kaj ĝi estingiĝas en mensogo. Inter la du kroĉiloj ĉeneriĝas mil mensogetoj. Jen la kateno, kiu sklavigas egale senhavulon, serĉantan la kialon de la Vivo kaj ĉiohavulon,

ĝuantan la parazitan sencelecon

La Vivo estas io stulta.

En la praarbara ĥaoso de la socio neeble estas trovi rektan vojon. La moralo estas ĉemizo, portata ĝis eluziĝo.

La Virto organiziĝas por ekspluati la malprudentan piemon. La Peko organiziĝas por nutri sin per akaparaĵo de la Virto. Poste ili ŝanĝas lokon. La iama virto fariĝas peko kaj la peko ektronas sur la piedĉestalo de la virto. Multmiljara komedio!

La Tero indiferece toleras, ke la homformikoj ludu reĝecon sur ĝia krusto. Egale estas ja, kiamaniere la homformikoj kunĝluas siajn sablofortikaĵojn: ĉu per larmoj kaj sango, ĉu per kraĉaĵo. La Tero estas simpla foirplaco kaj nenio pli. Nur foirplaco, luata de la Granda Brokantisto: la Vivo.

Sur tiu foirplaco svarmas, marĉandas, kompromisas, ribelas kaj humiliĝas la homformikoj . . . Eterna marĉandado kun la Granda Brokantisto.

Vana marĉandado. La Brokantisto vendas egalpreze siajn varojn. Ĝi postulas la saman prezon por la plej aĉa almozula sako kiel por la plej luksa silka talaro. Ĝi pagigas por ĉio per larmo kaj sango.

La aĉetinto havas solan rajton: li povas sakri, malbene subtaksadi la varon.

La Brokantisto impertinente rikanas rekte al via vizaĝo, ĉar Li scias, ke ni estas senmensaj cerbuloj, kiuj neniam povos sukcese ribeli.

Neniam! Neniam!

Ĉu neniam? Ĉu ni ne povus mortigi por ĉiam tiun ĉi kruelan akapariston? Ĉu la Brokantisto, la Vivo mem, estas senmorta?

Kial ni lasas allogi nin per la NENIO, pakita en kolorajn paperojn? Kial ni toleras la mistifikon, per kiu la Brokantisto faras nin sia kunkrimulo? Kial do?

Ĉar ni estas senmensaj cerbuloj. Ni ĉiuj. Escepto ne ekzistas. Vane estas la armilo en nia povo kaj en nia konscio, la varoj de la Brokantisto vualigas nian klaran vidon. La efemeran ĝuon ni vestas

en mensogojn kaj al la suferoj ni imagas noblajn celojn. Ni kreis falsan moralon, kiu faras la daŭrigon de la homa raso — sankta devo.

Kial? . . . Ĉar ni estas senmensaj cerbuloj.

Se ni estus menshavaj cerbuloj, ni mortigus la vivoĝermon en ni. Per nia forpaso finiĝus la homa sufero sur la Tero. La foirplaco restus baldaŭ sen aĉetantoj.

Se ni estus menshavaj cerbuloj, ni ne pagus teruran akcizon per nasko de nova viktimo al la Brokantisto. La rancaj varoj de la tempmordita butikoj fine havus merititan finon: putradon. Neniu bezonus plu plezurfrakon, eluzitan de delikataj sinjoroj, nek martirtalaron, makulitan de sango de centmil revemuloj.

Sed . . . sed ni estas senmensaj cerbuloj. La Granda Brokantisto neniam havos laborĉeson en sia butikoj.

Laborĉeso estas nebla, sed ankaŭ la laboro estas malebla.

Laŭ cirkla linio kuregas la ĉaro de la Progreso en la areno de la mondhistorio. Ĉiam runde . . . runde . . . Nur la takto ŝanĝiĝas. La muziko varias. La publiko havas novajn kostumojn. La cirka prezentado ĉiam restas la sama. Ĉiutage arlekenoj dronas en la propran sangan por kontentigi la altestimatan senmensan amason.

Cirko en la mezo de la foirplaco; jen la mondhistorio.

Ĉu tragedio, ĉu komedio? Egale! La maklerado, brokantado pri la ĉifitaj ĉifonoj de l' Jarmiloj estas konstante sur la programo. Ĉiam validas la samaj enirprezoj kaj ĉiam ripetigatas la sama arlekena tragi-komedio.

Fi! La Vivo estas io stulta.

Vesperigatas . . . Starante en la subira lumo de la suno estas amuze rigardi la tumultadon sur la foirplaco. Ho, korsiĝe amuze estas rigardi!

La Brokantisto plengorĝe hurlas: «Venu, karaj senmensaj cerbuloj! Mi havas mirinde belajn varojn. Absolute novaj varoj, kiujn

vi ne konis ĝis nun!»

La homformikoj svarmas antaŭ la montra fenestro. Ili forgesas rigardi la fiksitajn prezojn kaj estas blindaj por vidi la averton: «Kredito ne ekzistas!»

La homformikoj tumultas, puŝas unu la alian por ĝustatempe provizi sin per plaĉaj galanteriaĵoj kaj . . . kaj . . .

Kaj ili pagas por kiso per larmoj, por amo per doloro, por celkonscio per persekutateco, por ideo per martireco, por celo per seniluziigo, por ekzisto per baraktado.

Jes, ja! Kredito ne ekzistas, Ha-ha-ha! Kredito?! Ĉu vi scias, kial la Granda Brokantisto ne donas krediton?

Ĉar krom la ununura mizera vegetado ni ne havos alian por pagi. La Brokantisto estas ruza loganto. Li donas «garantian dokumenton», kiu rajtigas nin por ricevi novajn varojn, pli plaĉajn, pli solidajn, en la transtomba filio de lia entrepreno: en la Paradizo.

Kaj ni estas senmensaj cerbuloj . . .

Granda Brokantisto, Vivo, mi abomenas vin. Mi kraĉas sur vian garantian dokumenton.

Vesperigās . . . La Suno baldaŭ subiros por mi . . . Mi pagos por la longminuta vegetado per ĉiama putrado.

Kion vi proponas, ruza Brokantisto? Ho, jes! La dankemon de la posteularo. Tre interesa varo! . . . Lasu min ridi foje rekte al via impertinenta vizaĝo!

Malfeliĉa posteularo, kiu ĉiam viktimiĝas pro la ideologio de la prauloj. La posteularo, kiu heredas de ni nian malprudenton: daŭrigi la vivadon kaj oferi sin por la — nenio.

Mi ne aspiras la dankemon de la posteularo pro tio, ĉar mi estis naiva revemulo, kiu deziris fari el la tera Infero almenaŭ tolereblan Purgatorion. Granda Brokantisto, donacu kredite vian varon al tiuj pozuloj, kiuj havis la bonŝancon esti kontentaj pri viaj aĉaj artikloj!

Vesperigās . . . La Suno subiras . . . La

agonianta brilo baldaŭ estingiĝos. Ho, Granda Brokantisto, en via butikio la sola valorplena varo estas — la Mortotuko . . . Sendeviza flago kun demandsigno, kiun vi ŝovas en la manojn de ĉiu vizitinto de via cirka komedio . . . Sed la demandsigno ne trompas min. Mi scias, ke ĝi estas komercista ruzajo, aludo pri via — garantia dokumento . . . Mi kraĉas sur la demandsignon!

.

Vesperigās . . . Foraj lumomondo ekbrilas laŭvice sur la nigriĝanta firmamento. La nemezurebla kupolo de nia eta mondo tiras min al la neatingeblaj altoj. La nuno forkuras de mi. Apenaŭ mi sentas la korpan ĉenon. Ankoraŭ mi konsciis, ke miaj piedoj fiksiĝas al la tera koto, sed tamen io subkonscia sugestas al mi strangan senton: mi leviĝas el mi por vidi min.

Mi flugas, alteniĝas. La karnoŝelo restas sube. Ĝi ŝajnas ridinde komika. La movoj, la gestoj, spirado kaj sentodanco de la trajtoj impresas kvazaŭ en la unua fojo mi vidus tiun konvulsian funkcion de mia meĥanismo.

Kiel mikrobe eta mi estas! . . . Kiel giganta mi estas!

Ne nur mi. La homformikoj, la homgigantoj, la dronantoj en la bagateloj kaj naĝantoj en la ĥaoso, ĉiuj subite havas duoblan memon. La unua batalas por la stomako; la dua, la vera memo, ĉene kun-kroĉiĝas. La longa ĉeno de la duaj memoj ĉirkaŭprenas la tutan Teron.

Kaj ankaŭ mi estas unu ĉenero . . .

Mia korpo tie sube baraktas, veas, ploras sakras, komike gestas, luktas, batalas, sangas, suferas kaj mi, la ĉenero, ne sentas kompaton al ĝi. Mi, la ĉenero, subite trovas ĉion komprenebla kaj miavola. Mi, la ĉenero, aprobas kaj ne komprenas la korpan ribeladon.

Strange! Kial?

Supren! Pli supren! Mi deziras altiĝi ĝis la lumomondo.

La horizonto larĝiĝas . . . Mi ne plu vidas mian karnoŝelon . . . La homformikoj malaperis.

Restis nur la unueca Homo, la leĝa sigelo sur la Tero.

Jen la celo, kiun la homformikoj batalantaj ne povas vidi pro la collarĝa horizonto. La homformikoj estas simplaj rimedoj, kiel en la manoj de la forĝisto estas la martelo kaj la ardanta ferstango. La forĝisto ne pensas pri la doloro de la materio kaj li ne havas orelojn por aŭdi ĝian veadon. Ni, la ĉeneroj, estas tro malproksime por aŭdi la helpokrion de la homformikoj. Ni direktas, ni forĝas, ni kreas kaj ne pensas pri la doloro de la karnoŝelo.

La unueca Homo volas naskiĝi . . . La unueca Homo volas okupi sian propre kreitan imperion — la Teron.

Strange! Kial?

Supren! Pli supren! Mi deziras flugi trans la kupolon de la firmamento.

Ne plu ekzistas supro kaj malsupro, nur spaco senlima, nur senfina ĉeno de miliardoj da kupoloj, nur eĉ pense nemezurebla longa vico de universoj.

La ĉenero konsciiĝas pri la harmonia leĝaro . . . La ĉenero sentas sin unu el tiuj leĝoj . . . Ĝi portas sur si la stampon de la Tuto.

Leĝaro?! Por kio?

Por la Vivo.

Leĝaro?! De kiu?

De la Vivo mem.

Celo?!

La Vivo en miliardoj da formoj.

Mi, la ĉenero, transflugas universojn por admiri la Kreantan Vivon, kiu tenas en si la leĝojn, rimedojn kaj celon . . .

Kaj sur la Tero mia karnoŝelo ekkrias: «La mondo estas korpo de Dio kaj la leĝoj regantaj en ĝi estas Lia spirito!»

Mia ĉenera memo trovas respondon pri la kialo de la unueca Homo, kiu volas naskiĝi kaj okupi sian propran imperion.

Ĝi havas la stampon de la Vivo.

Fariĝi leĝo, rimedo kaj celo por si mem.

Kaj sur la Tero en la karnoŝelo vekiga rememoro pri aserto de la Biblio: «Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, . . .» Lia bildo estas la kreovolo kaj kreopovo.

Kaj la homo, la eternaj Adamo kaj Evo, plenumas sian destinon. La homo konsideras sin leĝo kaj rimedo sur la Tero por atingi la celon — *sin mem*. Kiel la Kreanta Vivo neniam laciĝas, same ankaŭ la homo senlace laboras. Kiel la Kreanta Vivo ne povas rezigni pri Sia dieco, same ankaŭ la homo senhalte klopodas konservi sian homecon kaj venki la materion, krei laŭplaĉe sian mondon, fari sin mem perfekta Homo.

La kreado de la Vivo ankoraŭ ne estas finita.

La kreado de la Homo daŭros multajn jarmilojn.

Periodoj detruas kaj kreas.

Generacioj detruas kaj kreas.

La jarcento estas nur unu minuto sur la horloĝo de la evolua historio. La noktomezo de la Homaro estas ankoraŭ tre malproksima. Ni vivas en la unuaj minutoj de la mateniĝo. Apenaŭ unu horo pasis depost la konsciiĝo de la primitiva homo ĝis la apero de la hodiaŭa tipo.

La fortikiĝo de la intelekto . . . Ĝiaj pompado kaj maturiĝo ankoraŭ kaŝiĝas en la burĝonoj de la Tempo.

Mi ne nur kredas, sed scias, ke la Printempo alvenos. La eternaj Adamo kaj Evo jam portas en si ĝian ĝermon: *la homan H o m o n*.

Lukto, batalo, sinpelado, erarvagado, sufero, ribelo okazas nur pro tio, ke la homformikoj preparu indan lokon por la alvenonta nova tipo: por la unueca Homo, kiu en harmonio kun la Kreanta Vivo fine trovos sian veran destinon en la Universo.

La nova tipo, la unueca Homo venkos la suferojn.

La korpajn dolorojn per kono de la naturleĝoj. La erarvagadon de la animo per nova etiko.

Kaj inter la sopiro kaj ago formiĝos fortika ponto, kies tenantaj kolonoj estas la unueca kaj unucela moralo: *ĉion por ĉiu!*

....

Estas vespero... La arĝenta lumo de la Luno vestas la mondon ĉirkaŭ mi. Ĉio kaj ĉiu havas fantoman lumrobon... Penso zigzagas tra mia kapo: ĉu efektive ni vivas?

La respondo tremas en tiuj pesimistaj kaj optimistaj ĝemoj, kiuj celas nur unu: la plifaciligon de la krucportado.

Ne nur tiun de mia kruco, sed ankaŭ tiun de la via.

La apudmetitaj kontrastaj pensoj simbolas la ĉiaman reviviĝon de la animo, netoleranta la mallumon de senceleco.

La pesimista vero enterigas la volon kaj sopiron. La optimista vero levas nin kaj kondukas sur la vojon de la agoj.

Kiu neniam havis pesimistan humoron, tiu neniam povas kompreni la suferojn de sia homfrato. Kiu neniam havis optimistan animstaton, tiun vizitis eterna blindeco. La nekomprenemaj kaj blindaj homoj forbrulas en propra fajro sen utilo por la homa komunumo.

Ili estas malkuraĝaj por ribeli eĉ kontraŭ si mem.

Mi kompatas ilin, sed helpi mi ne povas.

Tamen staru ĉi tie sincera konfeso: nur en tiuj momentoj mi estis vere feliĉa, kiam mi sukcesis forgesi pri mi mem kaj mi pensis pri aliaj; plejterure mi sentis la premon de malfeliĉo, kiam mi dronis en la zorgoj pri mi.

Forgesu pri vi mem kaj neniam vi havos kaŭzon por plendi... Via rido estos ne nur masko, sed sincera respeguliĝo de via animo.

Pensu nur pri vi kaj vi nutros vin el la fonto de larmoj... Via kompato pri vi mem kondukos vin al abismo.

....

Facile estas prediki, vi pensas, sed sekvi la konsilon estas neeble.

Vi pravas, sed ne tute.

La hodiaŭo malfaciligas multon, sed la alvenonta etiko bezonas preparan laboron. Ni provu kaj ekzercu! Ni serĉu rimedojn!

Mi provis kaj ekzercis.

La senflugila homo jen flugas... La dirata vorto dum momentoj ĉirkaŭkuras la Teron... La homaj gestoj, movoj, paroloj, okazintaĵoj estas eternigeblaj.

La evoluanta Homo jam venkis la aeron, maron, tempon. La evoluanta Homo venkos ankaŭ en si ĉion, kio nun malhelpas la liberan flugon de lia animo.

Per kio?

Per la volo, karakterizanta lian originan spiriton — La Kreantan Vivon.

Laŭ kiu vojo?

La collarĝa horizonto malebligas la precizigon.

La homo savos sin per la — *H o m o*.



Hungara kuabineco manĝanta akvo-melouon,

Ideoj tra Esperantujo

Pri "Mal".

Camille Aymonier, emerita profesoro de lingvistiko, Bordeaux (Francujo).

Mi ne rajtas paroli en la nomo de la franca lingvistiko, sed ŝajnas ke tie ĉi ne estas bezonata scienco, sed nur iom da simpla saĝo. Jen do la temo: «Ĉu iam en la franca lingvistiko oni rimarkis ke *malheureux* (malfeliĉa) havas sonon de *heureux* (feliĉa)? La akcento ja estas sur la lasta silabo en la franca lingvo. Kiam iu ekkrias *malheureux!* ĉu iu povus miskompreni kiel *heureux*? Tio estus ĝuste kion D-ro Kalocsay kaj Kompanio pretendas!»

Se mi ne malbone komprenas, ŝajnas ke en *heureux* kaj *malheureux* la orelo aŭdas nur la lastan silabon; ke *heureux* kaj *malheureux* konfuziĝas; ke la kontraŭoj estas similaj; ke *jes* estas egala al *ne*. Oni efektive iam pretendis ke la lingvo homa komenciĝis per la identeco de kontraŭoj, pretekste ke la logikaj kontraŭoj troviĝas latentaj en la spirito; ke *varmo* vokas *malvarmon!*

En la franca lingvo la lasta silabo estas prononcata kun iom pli da forto, sed ĉiu silabo estas malkonfuze prononcata. En aliaj lingvoj la akcentata silabo formanĝas, aŭ premas kaj preskaŭ malaperigas la antaŭajn silabojn; en franca lingvo, tio neniam okazas.

La unua silabo estas do prononcata tiel nete kiel senakcentaj silaboj, aŭ pli nete, pli forte, ĉar ĉe plursilaba vorto la voĉo atakas forte la unuan silabon, frapas ĝin, laŭ iu gramatikisto, kiel per martelo. Estus vere bedaŭrinde, ne tolereble, ke francoj neniam sciis ĉu ili estas *malfeliĉaj* aŭ *feliĉaj*, *malhonestaj* aŭ *honestaj*; ke ili miskomprenus la grandnombrajn vortojn, kiuj komenciĝas ne nur per *mal*, sed per *in*, *il*, *im*..., unuvorte ĉiujn vortojn neajn, kaj sendube, precipe la vortojn multsilabajn: *in-constitutionnellement*, *in-déracinable*, *in-vul-*

nérable... ktp.

Ni parolu serioze! Ĉu oni povas pretendi senriske ke kiu parolas, tiu ankaŭ pensas, ĉar oni ŝerce diris pri iaj babilemuloj, ke ili pensas nur kiam ili parolas. Oni parolas por kompreniĝi, tiamaniere ke oni kompreniĝu. Ĉar, ĝenerale, la prefikso aldonas nuancon de senco al la radiko, tie ĉi *mal* aldonas ideon ĉefan, ĝuste kontraŭan, ĉu ne estas memsekve ke la parolanto insistos, kaj, pli aŭ malpli senteble, preskaŭ disigos la prefikson de la radiko, kiel faras la spirito dum la legado. Iu moderna filozofo kutimas skribante apartigi per streketo ĉiujn prefiksojn, por ke la vorto ricevu sian plenan etimologian valoron. Tion ni faras, instinkte, pli aŭ malpli kiam ni parolas. Profesoro invitas siajn lernantojn, *à re-voir*, *re-vidi* la kurson; oni parolas pri agado *anti-sociale*: *kontraŭ-socia*; pri *contre-vérité*: *malveraĵo*; pri *loko mal-odorant*: *malbonodora*.

Vorto ricevas ankaŭ tion kion oni nomas *accent oratoire*, per kiu tradukiĝas la diversaj sentoj, pasioj de la parolanto. *Ma'lheureux!* *Ma'lhonnête*: la precipa akcento kuŝas sur *mal*.

Ne forgesu cetere, kaj vi ne forgesos, ĉar vi mem ĝin rimarkigis, ke la kunteksto preparas, divenigas, atentigas la vorton kun ĝia ĝusta senco.

Povas okazi tamen ke en iaj kazoj ne sufiĉa atento kaŭzus eraron, miskomprenon aŭ duban sencon. En tiuj kazoj ne priresponda estas, ne kulpa la lingvo. *Aliquando bonus dormitat Homerus*: *Ia'aje la bona pocto Homero dormetas*... Ekzemple, kiam vorto estas sola, izola, en mallongaj ordonoj: *Malfermu, fermu la pordon*; *Iru dekstren, maldekstren*... En artilerio, por reguligi la pafadon, oni unuan fojon pafas plilonge, pli malproksimen, duan fojon pli mallonge, pli proksimen, por enkadrigi la celon, kaj estas ordonate: *Long, court*: *longa, mallonga*...

Jen eble la vera kaŭzo kiu instigis kelkajn

alpreni novajn vortojn, nekalkulante la postulemajn rimemulojn! Vi konstatos ke en sia Nov-Esperanto Sro de Saussure, kvankam li principe ŝanĝis tre malmulte la vortaron, adoptis kelkajn duoblajn formojn: *apert*: *kloz*; *kurt*: *long*; *lent*: *rapid*; *sinster*: *dexter*; *anter*: *poster*; *super*: *infer*; *proksime*: *for*... kiuj renkontiĝas tre ofte en la konversacio, cetere tre malmultnombraj.

Ni mem adoptis prave teknikajn vortojn *babordo*: *tribordo*: *dekstra*, *maldekstra* flanko de ŝipo. Niaj ĉikanemuloj eble, eĉ tie ĉi, pretendus ke la radiko estas la sama, kaj sama la silabo akcentita! Oni rimarkus ankaŭ kelkafoje duoblajn formojn en la ordinara lingvo: *malsama*, *diferenca*...

Klareco, facileco, plej facila, certa komprenebleco, jen la leĝoj de Esperanto. Oni diras france: *Le besoin crée l'organe: bezono produktas la ilon respondan*. Ĉu en iu momento de la evoluo kelkaj duoblaj formoj montriĝos oportunaj, pravigonte per plia facileco, klareco, la estonto decidus; sed neniam la principoj de la vortkunmetado endanĝerigos, difektigos la lingvon. La afero estus nurpri iaj malmultaj aldonoj, neniam pri modifoj, aŭ ŝanĝoj.


Miaparte ofte mi klarigis ke per la prefikso *mal*, la lingvo akiras pli da facileco, mi ne diras pli da varieco; ke ĝi certe ne malgajnas rilate al klareco.

* * *

Defio al la malamikoj de "mal".

J. Major

Kiel ni jam skribis en O.I., «mal» estas la plej vivanta prefikso en nia lingvo. Ni pruvis per ekzemploj el la franca lingvo, ke ĝi funkcias tute same kiel la franca prefikso «mal». Nun profesoro Aymonier, milfoje pli kompetenta ol ni, atestas ankaŭ en nia favoro. Ŝajnas, ke neniun miskompreno okazas en la franca lingvo pro «mal». Se oni volas speciale akcenti la *malan* kvaliton, oni akcentas kontraŭregule la komencon de la vorto. Kial ni ne farus tion en Esperanto? Tio estus preferinde ol enkonduko de abort-radikoj kiel kurta, lenta, aperti kaj la ceteraj. La diskuto estas fermita ĝis kompetenta opini-esprimo por aŭ kontraŭ «mal».



Ĉinaj veturiloj, uzataj sur kruda vojo, ĉefe en la provinco de «Jê-ho».



Japanaj Humoro

Prof. B. H. Chamberlain

Seriozaj ideoj estas eksporteblaj. La humoro de iu nacio estas nur por hejma uzo: — ĝi forvaporigis antaŭ ol transiri la landlimojn. Pro tio ni ne povas doni detalan analizon por fremdulan pri la specialaj karakteroj de l' japana humoro. Sed eble oni povus diri simple, ke la japana humoro . . . *ne ekzistas*. Ĉar certe ĝi neniel similas al la franca «esprit» (=sprito), tiu infano naskita de l' pura intelekto kaj socia rafiniteco kaj edukita en la *salono* kie la konversacio atingas la nivelon de vera arto kaj kie ĉiu vorto estas kvazaŭ glavo kaj ĉiu akcento estas malpeza kvazaŭ aero. Kaj ĉu ni komparus ĝin al la stranga miksaĵo, kiun la Norduloj nomas «humoro» — en kiu grotesko kaj patoso interbatalas? Eble ĝi estas iom pli proksima al tiu ĉi. Sed ne tute, — mankas al ĝi la kaŝita larmo kaj ankaŭ la mem-kritiko: — ĝi ne havas ironion, nek flankajn aludojn. Ĝi estas pli proksima al la ideo kiun ni havas pri la antikva *saturnalia* de Romio, la simpla gesto, la drasta ŝerco, la kruda anekdoto, la laŭta ekridego, duon-sensencaj kantetoj, pulĉinelado, klaŭnludo, karnavala amuzego. Ĝi estas senarta, vaste populara, eĉ vulgara. Ĉi tio estas la rezultato de certaj faktoroj. La antikva japana nobelularo neniel estis ridema: «Vivo reala, vivo serioza» — estis la moto de ĝia vivo kaj kia senviva vivo ĝi devis esti! Ĉar antaŭ ĉio, tiu socio estis sen virinoj. Admiri la tualeton de korteganinoj, kaŝobservi iliajn ridetojn, eble eĉ suflori ĝentilaĵojn al iliaj oreloj, — ne apartenis al la tagordo de iu *daimio*^① en la kortego de l' Ŝoguno^②. Vi povas ankoraŭ observi lin sur la scenejo, kvankam li jam malaperis en la reala vivo. Tie li sidas, — kun rigida dorso, senespri-

ma mieno, kun malmultaj gestoj similaj al la amelo de liaj blankaj vestaĵoj, kun lia tuta memo ĉirkaŭbarita de komplika kaj rigida etiketo. Memoru, ankaŭ, ke la despota registaro malpermesis eĉ epigramojn: — unu sola nekonvena gesto sufiĉis por ke iu estu ekzilata sur unu el la Sep Insuloj de *Izu*, ĝis la natura morto. Spionoj svarmis ĉie; la muroj — en tiuj ĉi paperdomoj — laŭlitere posedis orelojn. La plezuroj (tielnomataj) de l' aristokrataro estis ceremonioj preskaŭ tiel solenaj kiel tiuj de l' registaro, — la pompa *Nô* aŭ lirika dramo, kun statuecaj aktoroj en amelitaj vestaĵoj kaj litanioj en de jarcentoj mortinta lingvaĵo, se ĝi iam vere vivis; aŭ la te-ceremonioj aŭ la florarangoj konformaj al filozofiaj principoj; aŭ la verkado de poemoj laŭ antikvaj modeloj; aŭ rigardo al kaligrafiaĵoj laŭ ĉinaj kanonoj. Fakte, la tuta vivo estis fermita en formalismo, kiel mumio en siaj tombaj vestaĵoj. La nura penso pri ĝi sufiĉas por murdi humoron.

La atmosfero en la malaltaj klasoj ne estis tamen tiel premita. La butikistoj kaj la metiistoj estis gajaj homoj — kiel ni vidas de la neimiteblaj desegnaĵoj de la libro titolita *Hokusai*. Tie ni legas kaj vidas iliajn hejmajn ŝercojn, parolojn de drinkuloj, spritajn kritikojn pri superuloj. Unu ilustraĵo montras aron da vaguloj mokantaj Konfuciisman saĝulon malantaŭ lia dorso: la procesio de feŭdala sinjoro (*daimio*) estas karikature desegnita kiel tiu de akridoj portantaj manton en korbo. Sed la teatro — kiun neniu nobelulo vizitis — estis ilia ĉefa amuzejo. Kompreneble, la lingvaĵo tie uzata ne estis tute klasika . . . Same en literaturo: la vulgaraĵoj estas multe pli amuzaj ol la perloj de l' antikva literaturo, kompreneble. Tamen, ni tie ĉi ne timas deklari, ke la japanaj vulgaraĵoj

① feŭdala grandsinjoro

② la Reganto

La Japana Danĝero

P. J. Zürcher, Amsterdam.

(Antaŭe redaktoro de «Telegraaf»,
la plej granda ĵurnalo en Nederlando)

En Nederlando, kiel ankaŭ en aliaj koloniposedantaj ŝtatoj de la Okcidento, oni kutimiĝis jam delonge al la esprimo «japana danĝero». Jam en la lernejo instruistoj klarigis al ni, kiom granda estas tiu «danĝero» por nia kolonia imperio. Japanoj havas intereson en niaj kolonioj, nome en Nederlanda Hindujo, Sumatro, Javo — oni diris al ni. En postaj jaroj mi demandis al mi, ĉu tia danĝero vere ekzistas aŭ ĉu ĝi vivas nur en la vigla fantazio de kelkaj ŝovinistoj kaj diplomatoj, unuvorte en la kapo de tiuj kiuj emas vidi fantomojn . . .

Estas fakto ke en la daŭro de la lastaj jardekoj Japanujo fariĝis potenca lando kaj ke ĝi dankas sian forton ĉefe al si mem. Se Japanujo estas disvastigema, en tio ankaŭ ĝi nur imitas la Okcidenton — pruvoj: la mondmilito kaj la antaŭaj koloniaj bataloj (angloj en Sudafriko, ktp). Ni Okcidentanoj ankoraŭ hodiaŭ sekvas la devizon: «se vi volas pacon, preparu militon.» Ni vivas en ŝajna pacifismo kaj kreskigas armeojn dumtempe. Ni do ne havas rajton riproĉi al Japanujo, ke ĝi ne volas esti senforta en societo de militemaj nacioj. Mi ankoraŭ bone memoras la japan-rusan mili-

ton, en kiu Japanujo venkis, je la miro de la tuta mondo. Kaj ĉiu scias pri la lastaj okazaĵoj en Ĉinujo, kies sekvo estis la glora fondo al nova ŝtato Manĉukuo. Tio estas beno por la loĝantaro de tiu terparto, kion ajn ĉinaj imperialistoj pensu pri la afero. Hodiaŭ ankaŭ en nia lando oni pli kaj pli komprenas, ke japanoj agis en la vera intereso de l' popolo, farante utilan kaj grandan laboron.

Pripensante tiujn ĉi aferojn en mia trankvila labor-ĉambro, ree prezentiĝas al mi la problemo: ĉu la japana danĝero vere ekzistas?

Kvankam mi neniam havis la feliĉon viziti la fean Japanujon, mi iam loĝis en Hindujo, Afriko, Javo — kiel redaktoro de granda gazeto nacia. Tie mi renkontis multajn japanojn, kies kulturo, bonvolo kaj dolĉeco estas ankoraŭ vive en mia koro. La japanojn mi ankoraŭ memoras pri ilia eleganteco kaj pitoreskaj vestaĵoj. De ili mi aŭdis ke la japanaj ĝardenoj estas veraj paradizoj, la temploj estas ĉirkaŭataj de piceco kaj pacemo. Mi havas la konvinkon, ke la japana popolo apartenas al la plej kulturitaj kaj civilizitaj en la mondo. *Popolo pia kaj pacema ne povas esti danĝera* por la mondo, sed kontraŭe, ĝi nepre devas esti profitiga, utila. La faktoj pri Manĉurio klare pruvas la supran aserton. Oni juĝu laŭ la rezultatoj akiritaj, ne laŭ transira periodo, laŭ ŝajno!

Mi do ne plu kredas al la legendo pri la «japana danĝero», same kiel pri aliaj legendoj («la fluganta holando», «marserpentoj» ktp.) Mi invitas ankaŭ la penseman publikon rideti pri tiaj fantaziaĵoj. Vivu Japanujo kaj ĝia aminda popolo,

verkoj estas pli decaj ol tiuj de aliaj literaturoj.

Ĉiuj eŭropaj formoj de l' humoro havas paralelon en Japanujo. Krom la vorto-ŝercoj bazitaj sur ĉinaj ideogramoj, la japanaj ŝercoj ne tiel malsimilas do al la okcidentaj. La komika poezio estas, kontraŭe, preskaŭ netradukebla. Por kompreni ĝin eĉ iomete, necesas koni la japanajn morojn kaj kutimojn, tradiciojn kaj superstiĉojn.

El «Things Japanese» tradukis J. Major.

Barbaro en Hindujo

Fragmentoj el la verko «Un Barbare en Asie» de Henri Michaux (eldono de Nouvelle Revue Française, Paris)

Elfrancigis J. Major

Anglo lavas sin tre regule. Tamen, por hindo li estas simbolo de malpuro. Hinduo pensas pri li malfacile sen vomo.



Ĉiuj «respektinduloj» en Hindujo jam de l' antikveco rezignis al Hindujo kaj al la tuta tero.

La granda miraklo farita de l' angloj estas, ke nun ili aspiras al sia lando.



Se la kristanoj volas vere konverti la hindojn, anstataŭ dek mil misiistoj «mezaj» ili devus sendi unu sanktulon.

Unu sola sanktulo konvertus dek miliojn da hindoj. Ĉar neniu raso pli estimas sanktecon.



Ĉasteco estas la bazo de l' magio.

La hindoj riproĉas al la katolikaj misiistoj (kiuj estas preskaŭ sen escepto fidelaj al sia promeso pri ĉasteco), ke ili ne eluzas sufiĉe tiun ĉi spiritan forton.



La eŭropano vojaĝanta en Hindujo baldaŭ komprenos, ke li estas alkoholulo — kaj, se li ne trinkas alkoholon, ke li estas alkoholulo senkonscia, speco milfoje malpli kuracebla.

Ne bezone estas iri pli malproksimen: viando estas alkoholo.

Kiam la fiksa rigardo de l' indiĝenoj lin agacos, li ne koleru, dirante: «tiuj ĉi mutaj okuloj min furiozigas», li scias, ke tiuj okuloj agacas lin ĉar ili entenas ion altgradan aŭ ne altgradan, sed kion li *ne komprenas*.

La fremdulo fastu do laŭ la parolo de

Mahometo, ke fasto estas pordo de religio.



La Gangeso aperas en matena krepusko. Nu, kion vi atendas? Adoru ĝin, ĉu tio ne estas evidenta?

Kial vi staras rigide kaj stulte kiel homo sendia aŭ kiel monoteismulo obstina nekapabla adori Sunon, ion ajn? La Suno levigas super la horizonto. Ĝi altiĝas antaŭ vi. Kiel ne adori ĝin? Kial ĉiam agi kontraŭ la interna voĉo?

Eniru la akvon kaj baptu vin mem, baptu vin matene kaj vespere, forigu la mantelon de l' malpuraĵoj.

Ho, Gangeso, granda estaĵo, nin bananta, nin benanta!

Gangeso, mi ne priskribas vin, mi ne desegnas vin, mi riverensas antaŭ vi kaj humiliĝas sub viaj ondoj.

Kreskigu en mi la rezignon kaj la silenton.

Ni preĝu, preĝu.

En Hindujo, se vi ne preĝas, via vojaĝo estas senutila. La solaj profitantoj estas la moskitoj.



La deco de l' virinoj kaj junulinoj en Bengalo, ilia modesteco kiu agacas tiom da eŭropanoj estas tamen admirinda kaj ripoziga vidaĵo. Tuj kiam ili ekvidas fremdulon, ili parte vualas la vizaĝon kaj forlasas la mezon de l' trotuaro, marŝantaj sur la ekstrema rando. Ili estas tiaj, ke la eŭropaninoj ŝajnas esti kvazaŭ publikulinoj kompare al ili. Kaj antaŭe mi pensis, ke anglioj estas sindetenaj! Apud la hindinoj, ho mizere! la honto estu sur ili kun mamoj videblaj, gamboj nudaj kiujn nenio protektas tiel ke pasanta hundo povus tuŝi

ilin...

Kaj ili vin rigardas, pensu nur. Ili ne mallevas la okulojn. Ili ne kaŝas la vizaĝon. Ili rigardas vin. Kun videblaj mamoj, pretaj al neimagebla atako.

Mi ĉeestis la eliron de fabrika laboristaro: laboristoj, laboristinoj. Ili apenaŭ parolis, tenis sin aparte, volvitaj en vastaj «sari». Kia sinteno!

Kaj tamen, kiam ili laboras, ilia reputacio perdiĝas.



Por hindo religio kaj kasto sole gravas; ĉio cetera estas neglektindaĵo. La signon de kulto li portas klare kaj videble sur la frunto: grandaj horizontalaj strioj diverskoloraj. Ĉi tion klarigas la fakto, ke li apenaŭ havas bezonojn. Kiam kontentigita, eŭropano ripozas sed hindo estas ĉiam kontenta. (Li manĝas nur unufoje tage, foje tagmeze, aliffoje frumatene, li dormas kiam ajn, kie ajn, sur kovrilo etendita surtere.)

Pri mizero kaj malriĉeco hindo neniam miras.

Oni rigardu nur iliajn hotelojn. *Dioĝeno* fanfaronis pri sia barelo. Nu, li tamen ne luis ĝin al familio, al fremdaj vojaĝantoj kaj li ne gastigis en ĝi siajn amikojn.



Ju malpli iu estas alirebla, des pli granda estas lia interna vivo.

Tia estas la anglo, tia la Bengalano.

Oni ne povas sufiĉe forte konsili al tradukantoj havantaj «lingvo-talenton», ke ili lernu la bengalan.

Neniu literaturo estas tiel miriga kaj bela ol la bengala. *Tagore* ne estas izola kazo. Ekzistas multaj verkistoj, centoj da verkoj de l' XIXa kaj XXa jarcentoj, tradukendaj, por kiuj mi donus la duonon de la tut-eŭropa literatura produktado.

La poemoj, romanoj, preĝoj estas facile tradukeblaj kaj ili emociigas nekontraŭstareble. Kiam mi legas bengalan verkon, post dek linioj da teksto, mi estas kaptita.

Estas en la bengala literaturo io vera, tute vera kiu estas tamen nek sankteco, nek vereco sed la vivo interna.

Ĝi ne trompas. Kontraste al iliaj poemoj, la niaj estas burleskaĵoj.

Kiam oni legas bengalaĵon, oni *devas* ĝin ami. Ĉe la legado oni ne rimarkas la malrapidecon de l' ritmo, kiu tiel ĝenas en la bengalaj filmoj. Min eĉ ili ne ĝenas sed eĉ la plej toleremaj eŭropanoj ne povas elteni unu tutan filmon bengalan.

Sed se la emo al ekkono regus fine la deziron pri rigardo al belaĵoj, jam ekzistus en Parizo speciala kinejo de bengalaj filmoj. Pensemuoj trovus tie materialon por meditado



La migrantaj muzikistoj — la patrino kaj ŝia filino — kantas *sinnai*, tragika amkanzono, laŭ akompano de la ŝamisen-muziko. Ili migras tra la stratoj por allogi siajn eventualajn patronojn. La pajlo-ĉapo portata de la patrino estas nomata *tori-oi-gasa*, bird-ĉasa ĉapo, ĉar tiu kapvesto estis uzata kiam oni ĉasis birdojn dum feŭdala epoko.

Japanana Legendo

(*La demona masko*

fiksiga al vizaĝo)



Tiu ĉi legendo estas okazaĵo antaŭ ĉ. 300 jaroj, kiam la fama bonzo Rennjo konstruis templon en la vilaĝo Joŝizaki, en norda Japanujo. Por aŭskulti liajn edifajn predikojn svarmis ĉirkaŭ li piemuloj, inter kiuj estis virino ankoraŭ juna, tre fervora tiel ke ŝi unu sola vizitadis la bonzan moŝton ĉiuvespere, malgraŭ la vojo sufiĉe malproksima.

Ŝi estis la edzino de la filo de farmisto Josabee kaj estas laŭdata de ĉiuj vilaĝanoj pro sia piema servado al la bogepatroj. Kontraŭe al ŝia bonkoreco, ŝia bopatrino estis tre malica. Ŝia templovizitado forte malplaĉis al la bopatrino, kiu, por tion malhelpi, fine decidis doni al ŝi grandan laboron ĉiuvespere: mueli rizon po pli ol kvin litroj (tiu ĉi estas tradicia laboro en tiuj provincoj). Tamen sen plendo ŝi volonte plenumis la laboron kaj iradis al la templo kiel antaŭe. La malica patrino duobligis la muelkvanton en la sekva vespero. Ŝi obeeme akceptis tion kaj ankaŭ ĉi foje finlaborinte la donitan taskon ekiris la vojon al la templo kiel kutime, eĉ sen lacigita mieno. Tagon post tago la kvanto de la laboro estis ankoraŭ multobligata, kaj tamen ŝi neniam ĉesis viziti la templon, krome la tempo, kiam ŝi ekiris, estis eksakte la sama en ĉiu vespero. La indigno de l' patrino nun atingis la zeniton.

En iu vespero senluna sed tre serena — alte en la ĉielo palpebrumis sennombraj okuloj kaj surtere brilis bela rosoguto sur ĉiu foliopinto. Sur la revena vojo ŝi venis

al la profunda valo, kie serpentumas kornico kun elstaranta rokego apenaŭ videbla en la stellumo, venanta tra densaj arbegoj. Subite tie ŝi ekvidis teruraĵon! Jen demono, kun du kornoj kaj la buŝo ŝiriginta ĝis la oreloj, minacis al ŝi la vivon per akra falĉilo. Tamen dank' al sia firma piemo ŝi estis tre aplomba kaj alparolis ĝin:

«Englutu aŭ disŝiru min laŭplaĉe; la religikredon tamen vi ne povas difekti en mi...»

La sekvan matenon ial neellitiĝis la bopatrino, kutimiĝinta al frua leviĝo. Kun scivolo la juna edzino do enrigardis la ĉambron kaj vidis tie la saman demonon kiu atakis ŝin en la lasta nokto. La demona masko, per kiu la malbonkora patrino timigis ŝin pro troa malamo, firme fiksiga sur la vizaĝo. Baldaŭ poste, la patrino tiom malica tamen sincere hontis pri siaj pekoj kaj kiam ŝi konvertiĝis antaŭ la bonza moŝto, la masko per si mem defalis, kvankam kun pecetoj da karno de l' vizaĝo.

(Trad: Isao Inoue)

Ĵus aperis!

«KONTURO DE OOMOTO KAJ UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO» — 6 grandformataj paĝoj kun belegaj ilustraĵoj, sur arta papero — konciza konigilo pri ambaŭ Movadoj. Mendu por I resp.-kupono ĉe:

Oomoto Internacia,
Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Japanana lingvo por Esperantistoj

«La japana lingvo — kun sia kurioza gramatiko, malcerta origino, antikva literaturo — estas lingvo inda al pli da atento ol ĝi ricevis ĝis nun.»

Prof. B. H. Chamberlain.

(24)

Konversacio (daŭrigo)

Ikaga desu ka?

«Kiel (vi) fartas?»

Ikaga de gozaimasu ka?

Sama senco al la supra, sed pli ĝentila (al superuloj).

Virinoj ĝentile uzas tiun ĉi formon.

Arigatō (gozaimasu);

Ai-kawarazu tassya desu.

«Dankon, ĉiam bone (mi) fartas.»

Okōsan wa ikaga desu ka?

«Kiel fartas (via) patrino?» (demando direktita al infano)

O'kake nasai!

«Bonvolu sidiĝi!» (eŭropaniere)

O'suwari nasai!

«Bonvolu sidiĝi!» (japanmaniere)

La respondo al *Arigatō* (dankon) estas *Dō itasimasite* (ne menciuj! volonte!)

* * *

Sceno ĉe manĝo

1) Je la komenco

Mastrino: O'agari nasai.

«Bonvolu manĝi.» (rimarko: la verbo estas en *i-radiko* antaŭ la ĝentileca verboformo «nasai») t.e. «bonan apetiton»

Gasto: Itadakimasu.

= laŭlitere: «(mi) prenas.»

2) Je la fino

Gasto: Gotisō sama.

= laŭlitere: «estimata regalaĵo» t.e. «je via sano» aŭ «dankon».

Mastrino: Nani mo gozaimasen desita.

laŭvorte = «nenio estis» t.e. nemonciinda, estis tro modesta. (japanoj estas ekstreme modestaj).

Por samideanoj vizitantaj Japanujon:

En Japanujo oni ne babilas pri la manĝaĵoj, ne prenas (kaj ne oferas) du foje el la sama manĝaĵo (*krom supo kaj rizo, kompreneble*). Kion oni ne volas manĝi, oni lasas netuŝita aŭ duone finita — sed oni ne pardonpetas pro tio. La mastrino de l' domo servas al ĉiuj sed ne necesas laŭdi ŝian lertecon, nek speciale okupiĝi pri ŝi kaj la ceteraj virinoj de l' domo. Alkoholajon oni ne prenas kun la manĝoj: kelkfoje oni trinkas arakon sed antaŭ la manĝo.

* * *

Sō desu ka?

Sō de gozaimasu ka?

«Ĉu tiel estas?» (ambaŭ). Tiu ĉi frazeto estas treege ofta, preskaŭ sen-senca parolo, simile al la eŭropaj lingvoj.

Hazimete o' Me ni kakarimasita.

Esprimo okaze de prezentiĝo: «Komence al okulo renkontis».

O' Kata

Sinjoro, -ino (sen nomo); kun nomo oni uzas 様 = «sama» aŭ «san» kiel postpozicio; [l] = «san» estas ankaŭ postpozicio por montoj kiel ĉe *Huzisan* (Monto Huzi, t.e. Fuji). Oni neniam diras en Japanujo «Fujijama».



Parolas la Legantaro

«Nia Movado bezonegas honestan kritikon.» B. Potts, Wellington, Novzelando

De tempo al tempo ni publikigas la opiniojn de nia Legantaro pri Oomoto Internacia. Denove ni havas la ĝojajn konigi al niaj ĉiulandaj amikoj kelkajn kritikojn venintajn el 12 landoj (3 kontinentoj). Oni rimarkos, ke ili estas ĉiuj favoraj. Tamen, oni ne kredu, ke ni simple prisilentas aliajn. Eĉ unu malfavoran kritikon ni ne ricevis ankoraŭ kaj el la laŭdoj ni multon forlasis — pro manko de loko. Ni petas niajn ĉeamikojn, ke ili daŭre bonvolu informi nin pri siaj senkaŝaj opinioj por ke ni povu redakti Oomoto Internacia laŭ ĝenerala plaĉo. Se ni nur sukcesas havigi al ni la aprobon de nia Abonantaro, kion ni zorgas pri kelkaj malbonintencaj «pikoj» sporade aperantaj sur gazetoj?!

La Redakcio

* * *

«En via bela O. I. mi tre ŝatas la artikolojn de sinjoro Hidemaru Deguĉi. Kiam mi legas Liajn liniojn, mi benas Lin. En nia bela ĉeĥoslovaka urbeto *Náchod* ni, pli ol tridek personoj, kunvenas kaj ni tradukas el via gazeto. Ni ĉiuj ĝojas havi *spiritajn fratojn* en la malproksima Oriento. Estu benata via laboro. La poemon de l' granda Majstro, *Mikaelon*, mi tradukis kaj aperigis en nia loka ĵurnalo: estus dezirinde ke la japanaj potenculoj konu la opiniojn de la granda Spiritulo!»

S-ino *Béla Raichlová*, del. de UEA,
Náchod, Ĉeĥoslovakio.

*

«Ĵus mi finis la tralegon de la ĝis nun ricevitaj numeroj de O. I. kaj multege ĝuis la bonegajn literaturaĵojn. Mi ne povas diri, ke mi estas jam Oomotano, sed mi akceptas viajn Kvar Principojn kaj ankaŭ Homaranismon. **Mi forte aprobas vian kontraŭneologisman batalon.** Dum la lastaj jaroj niaj verkistoj kvazaŭ frenezigiĝis. Oni jam ne povas rekomendi al lernantoj novan esperantaĵon, ĉar la naciaj vortaroj ne enhavas la vortojn en ili uzatajn. Estas kvazaŭ fremda, nekonata lingvo! En via

gazeto, kontraŭe, nur malofte mi trovas nekonatan vorton (mi ne havas la Plenan Vortaron). Sed bonvolu atenti pri preseraroj! — Mi sekvas vian Japanan Kurson, sed ĉar mi jam havas 65 jarojn, mi ne lernas la ideogramojn. La Kurso estas ja tre interesa.»

W. L. Waterman, Mile End, Suda-Aŭstralio.

*

«*Filozofio de Oomoto kaj Orienta Filozofio* estas la rubrikoj en O. I. de mi plej ŝataj. Bonvolu konigi ankaŭ la *socian vivon* de Japanujo. En *Kompara Religiscienco* bonvolu rimarkigi la vidpunkton de orientanoj, se la artikolo estas verkita de okcidentano. Mi ŝatus serion pri Ŝintoismo aŭ Judaismo. Mi dankas viajn informojn pri la Domo de Homamo kaj ĝoje notas, ke en ĝi estas *nur homoj*, ne Ŝtatoj, aŭ nacioj. Via artikolo «Japanujo kaj la Mondo» (jan.) estas pacema; ŝajnas ke Okcidento kaj Oriento ambaŭ deziras Pacon. Nuntempe ĉiu lando deziras mem juĝi pri sia devo (Komparu la britan vidpunkton pri sia devo laŭ la traktato de Lokarno al tiu de Japanujo koncerne Manĉurion!). Intertempe, ĉiu lando dubas la juĝkapablon de l' aliaj... Vera paco postulas *sendependan juĝon*» (Redakcia Noto: bedaŭrinde ĝis nun mankas tia sendependa tribunalo).

Doktorino Erie Evans, Bangor, Britujo.

*

«Via bela revuo estas al mi tre utila por la propagando de Esperanto ĉe idealistoj. Mi jam malfermis novan kurson ĉe Teozofia Societo. Elkoran dankon por la alloga aspekto de via revuo; ĝi markos novan epokon en la propagando de nia lingvo.»

I. G. Braga, Rio de Janiero, Brazilo.

*

«Mi esprimas mian plenan aprobon pri la idea enhavo de O. I. Mi varme gratulas

vin pro la trafa elekto de l' materialo kaj deziras al vi daŭran sukceson.»

E. Rodriguez, Buenos Aires, Argentino.

*

«Mi estas feliĉa konstati, ke en la malproksima oriento ekzistas grava, ĉien-radianta Esperanto-organo, kiun instigas tiel puraj kaj laŭdindaj principoj. Oni nur povas deziri, ke vi kuraĝe daŭrigu vian agadon por la fina triumfo de l' bonaj intencoj surtere.»

Profesoro F. F. Kiehl, Prezidanto de Hagenova Esperantistaro, Haĝuenaŭ, Francujo.

*

«Mi multe ŝatas vian eldonajon kaj pro ĝia stilo kaj pro ĝia larĝa amplekso.»

W. H. Fenton, Vancouver, Kanado.

*

«O. I. estas tre interesa; ĝi estas unu el la plej bonaj en Esperantujo kaj ĝi eĉ povas servi kiel modelo por aliaj gazetoj. Ĝi meritas ĝeneralan atenton, ĉar nur konante la Orienton ni povos fari «unu grandan rondon familian». Bonvolu skribi pri Ŝintoismo kaj ne forgesu ilustraĵojn!»

F. Cunokla, Brno, Ĉeĥoslovakio.

*

«La enhavo de O. I. estas interesege kaj multspeca; la lingvaĵo estas tre facila. Mi ĝojas, ke tia gazeto aperas en Esperanto.»

W. Klingenberg, Hildesheim, Germanujo.

*

«Lastatempe la valoro de l' dolaro malaltiĝis; se mi devas sendi la kursdiferencan, bonvolu min averti: volonte mi pagos pli, ĉar O. I. valoras multe pli ol ĝia koto. — Antaŭ nelonge iu demandis al mi ironie, ĉu Esperanto vivas ankoraŭ. Kiom li miris kiam mi montris al li la gazeton!

Jam delonge li lernadas la japanan lingvon sed neniam ankoraŭ li trovis tian perfektan instrumentodon kia la via. Li tuj abonis la revuon, ankaŭ! Bedaŭrinde, malmultaj kleruloj en Eŭropo scias pri la disvastiĝo de Esperanto en la Oriento.

Filozofio de Oomoto formas la animon de la revuo. Skribata en bona Esperanto, ĝi estas tre facile komprenebla. Naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj ne tiel penas klarigi ĉion al la legantoj kaj specialaj revuoj estas tro komplikitaj por ordinaruloj. Interesege estas ankaŭ viaj artikoloj pri japana vivmaniero, ja eĉ el scienca vidpunkto. Bonvolu plimultigi tiajn artikolojn. **Pri viaj senpartiaj recenzoj mi jam ofte esprimis mian plenan konsenton.** La defendantoj de nia kara lingvo jam akiris multajn partianojn kaj mi ankaŭ estas inter ili. La tiurilata Rezolucio, akceptita en la Japana Esp. Kongreso en *Kioto* pravas, ke la zamenhofa ideo kaj la lingvo povas fieri je lojalaj batalantoj. Vivu la Internacia Lingvo, kiun nia Majstro dediĉis AL LA TUTA MONDO — AL ĈIUJ POPOLOJ. Vi estu ankaŭ ĝia Defendanto, patro *O. Deguĉi!*

J. Hanuŝ, del. de UEA, Ĉeská Lipa, Ĉeĥoslovakio.

*

«Mi ĉiam plezurege legas vian O. I. ĉar per ĝi mi lernas multon pri la tro malmulte konata Japanujo. Certe via gazeto pliproksimigos Orienton kaj Okcidenton. La artikoloj de sinjoroj Hidemaru kaj Major ĉiam alportas al mi grandan plezuron. Legante tiujn, oni komprenas, kial la *orientaj filozofioj kreskigas la harojn kaj longigas la vivon.*»

C. C. Cowling, Hobart, Aŭstralio.

*

«O. I. tre plaĉas al mi laŭ-enhave kaj ankaŭ laŭ-lingve. Nur domaĝe, ke ĝi ne aperas pli ofte. (Redakcia noto: ĉu *monata gazeto* povas aperi pli ofte ol ĉiumonate? En 1934 ne aperos duoblaj numeroj sed 12 regulaj; en 1935 tutversajne ni ape-

rigus surprizajn aldonojn). Japanujo nun staras en la centro de l' Intereso, sekve viaj tiurilataj artikoloj estas tre bonvenaj. En Eŭropo oni timas «japanan danĝeron». La rolo de Esperanto estas tie ĉi mildigi miskomprenojn. — Mi ŝatus, ke vi eldonu esperantan lernolibron de la japana lingvo (Redakcio: nun preparata).»

Profesoro D-ro *Erd. Sahliger, Tranĉén,*
Ĉeĥoslovakio.

*

«Lastatempe via gazeto treege pliboniĝis. Bela, klasika stilo, ĉarme elektita materialo. Senerare, zorge ellaborita, klasika stilo. Ni esperantistoj ĝoju, ke la plej bela gazeto en la mondo aperas ĝuste en nia lingvo. (Redakcio: la fakto, ke ni represas la opiniojn de niaj altsatataj Legantoj, ne pravas, ke ni konsentas en ĉiuj punktoj!). O. I. jam estas inda verda lumturo kiu dissendas siajn radiojn al la tuta mondo. Grandega lumturo spirita — el la lando ĉiela Aŭroro aperis en Oriento, ŝirmanto de l' zamenhofaj idealoj.

La Oriento jam naskis multajn profetojn; la lasta el ili estas O. Deguĉi. O. I. batalo por la Savo al la Mondo, por la Eterna Paco.»

S. Vitanov, Dupnica, Bulgarujo.

*

«La bela kaj facila stilo de O. I. instigis min aboni la revuon.»

Martti Suominen, Kokemäki, Suomi
(Finlando).

*

«Mi ĉiam legas O. I. kun granda intereso ĉar ĝi estas unu el la plej interesaj revuoj. Mi sekvas la Japanan Kurson kun granda intereso. Bonvolu trakti amplekse la japanajn vivkutimojn. Mi ankaŭ ŝatus sciigi

pri la teĥnika flanko de l' japana vivo. (Redakcio: ne ekzistas esenca diferenco en tiu fako kun la Okcidento; pri eltrovoj kaj sciencaj esploroj originalaj ni ne estas kompetentaj). Mi instruas Esperanton al kamaradoj en Tunizio, ili verŝajne ankaŭ fariĝos abonantoj de O. I.»

G. Perchizet, Droux par Chalon-sur-Saine, Francujo.

*

«Amikoj! Ju pli mi legas vian monatan organon, des pli mi ŝatas ĝin. Jen finfine organo senhipokrite anoncanta esencajn principojn de Homfrateco tra la mondo.»

J. Eliot, Willoughby, NSW, Aŭstralio.

*

«Tute objektive mi povas diri al vi, ke via revuo fariĝas ĉiam pli interesa ankaŭ por tiuj eŭropanoj kiuj ĝenerale ne tre interesiĝis ĝis nun pri via movado. Tion mi konstatis dum miaj diversaj vojaĝoj tra Eŭropo. Mi tre konsilus al vi komuniki multe da informoj pri la Ekstremoriento, pri ĝiaj kulturceloj, pri ĝia modernigo, pri ĝiaj literaturaj kaj artaj celdifinoj. Tiamaniere Oomoto Internacia povas fariĝi unu el la plej gravaj organoj kiuj konatigas Orienton al la Okcidento.»

Julio Baghy

*

«Mi estas tre kontenta, ke Esp. disvastiĝas en via lando, ĉar estas grava punkto, ke ĝi servas al Orientanoj same kiel al Okcidentanoj: la Orientanoj helpas firmiĝi la vortaron de Esperanto kontraŭ la neologisma intrudo.»

S-ino E. L. Osmond, London.

*

«O. I. estas ja tre serioza, grava kaj bonega esperanto-revuo kaj mi kredas, ke neniu esperantisto povas rifuzi ĝin legi; eĉ se niaj opinioj estas antipodaj.»

Johano Rodeiro, Cordoba, Argentino.



★ «Kompleta Verkaro de Sinjoro Onisabro Deguĉi» pri kiu ni jam kelkafoje anoncis kaj ankaŭ publikigis la gratulojn senditajn de fremdaj samideanoj, nun aperis en pompa aspekto. Ĝia eldonejo «Banjuu-ŝa» (en Tokio) komencis ekŝpedi la unuan volumon, kiu temas pri «Universala Homamo», ekde julio kaj daŭrigos eldoni la sekvajn ĉiumonate po volumo. Fakte la Verkaro kaŭzis grandan sensacion en la tuta popolo japana kaj pli kaj pli oni agnoskas la eksterordinaran homecon, vere dian, de majstro O. Deguĉi.

★ La 30an de majo, Sinjoro *Hidemaru Deguĉi* forlasis nian Centron de Kameoka por propagandvojaĝi en Manĉukuo kaj en norda Ĉinujo, por la kvara fojo. Sinsekve li vizitadas la filiojn de Oomoto kiel ankaŭ de Ruĝ-svastika Asocio kaj de Tsaili-Hui, kiuj ambaŭ estas niaj fratmovadoj de kelkaj jaroj. Kiel ĉiam, lia vojaĝo alportas belajn fruktojn por firma kunfando spirita de tieaj diversgentanoj. Estas senbezone speciale diri ke ĉie li estas varmege bonvenigata.

Lia sekretario s-ro N. Ito estas fervora kunlaboranto de nia Esperanto-Fako kaj neniam forlasas eĉ etan okazon por propagandi kaj plivigli la movadon de nia Lingvo Internacia.

La vojaĝo daŭros 2-3 monatojn.

★ Sinjoro *Gerold Eckelmann* alvenis al Japanujo kaj nia redaktoro bonvenigis lin en la haveno de Kobe, kune kun kelkaj lokaj samideanoj. S-ro Eckelmann estas speciala raportisto de «Heroldo de Esperanto» kaj li venis el Germanujo por studi la japanajn kondiĉojn surloke kaj informi la mondon pri Japanujo pere de Esperanto. En siaj recenzoj s-ro Eckelmann montriĝis sagaca verkisto kiu bone komprenas la spiriton de l' Oriento. Tial ni deziras al

li plenan sukceson kaj promesas, ke ni helpos lin en la plenumado de liaj taskoj. Kiam li vizitos nian Oomoto-Teritorion, li estos certe tre bonvena.


★ De kiam ĉieliris la kara patrino de la Majstro jam pasis unu jaro, kaj la 20an de junio la unujara memorfesto por ŝia nobla animo estis solene okazigata, kun la ĉeesto de la Majstro, liaj familianoj kaj multaj Oomotanoj, en la lastatempe konstruita domo «Gjokusui-den» de Anao, lia naskloko tre proksima al Kameoka.

★ Dank' al energiaj laboradoj de niaj pioniroj, Universala Homama Asocio sane kreskas ankaŭ en la mandatita insularo sur la Pacifiko. La 13an de julio s-ro *Makisi Iialte* el Ponape-insulo vizitis la U. H. A. -Centron de Kameoka, akompanate de nia misiisto s-ro Kida. Li estas la unua indiĝeno kiu venis al ni de tiom malproksima Suda Maro por mem studi pri la movado. La bonveniga kaj parolada vesperoj estis vigle okazigataj kun la partopreno de l' tuta membraro de la Centro. Li estas ankoraŭ juna sed jam tre populara inter la popolo, tiel ke oni taksas lin kiel la sekvan gentestron. Li bone posedas la japanan lingvon kaj ĉe la parolado jam promesis sindonan U.H.A.-propagandon post hejmeniro. Ni do esperu la brilan estonton por lia sukceso kaj prospero de U. H. A. en la Suda Maro.

★ Longe atendita *fonografdisko* de la poemoj



Nia gasto el Suda Maro s-ro *Makisi Iialte* (dua-vice, la 5a de maldekstre) ĉirkaŭata de Oomoto-Esp-istoj kaj -Rômaziistoj, en la Teritorio de Kameoka (5. julio).



Grupo de U. H. A - membroj antaŭ la filio de San Paŭlo, Brazilo.

de la Majstro O. Deguĉi nun aperis ĉe Kompnio «Columbia», Tokio. La enparolinto s-ro Jukio Miki estas juna Oomotano kaj talenta poeto, precipe lia belega recitativo estas fame konata en la lando. La disko estas varme bonvenigata.

★ Ĝojigaj raportoj ofte venas ankaŭ el Brazilo: «Niaj ideoj vigle disvastiĝas tie ĉi kaj aliĝantoj al Universala Homama Asocio ne nur de japanoj sed ankaŭ sufiĉe da brazilaj gesamideanoj pli kaj pli multiĝas... S-ro Valentino (Ypameri) propagandas Oomoton per portugaliaj ĵurnaloj... Nia agema konstanta korespondanto s-ro I. G. Braga (Rio de Janeiro) ĉiam publikigas la artikolojn el nia «Oomoto Internacia» en deko da spiritistaj gazetoj kaj tiamaniere li kunlaboras kun ni por kunfandi tutmondajn spiritualismajn kulturojn.

★ Kiel la legantoj scias, nia Majstro O. Deguĉi estas genia ankaŭ en la verkado de poemetoj «ŭaka» (31-silaba). La poemetoj ĉiutage farataj nombriĝas centoj, kiuj estas ne nur belaj sed ankaŭ tre ofte profetaj kaj edukaj. Lia taglibro estas skribata per «ŭaka».

En la lastaj tri jaroj lokaj Oomotanoj starigis ŝtonajn monumentojn, sur kiuj poemetoj de la Majstro estas gravuritaj;

nuntempe ĉ. 50 da ili staras en la teritorio de Lokaj Oomoto-Domoj, troviĝantaj disde tra la tuta Japanujo, de norda Hokkaido ĝis suda Formoso.

★ Kun la celo pliprofunde eduki la junajn Oomotanojn, laborantajn en nia Oomoto Teritorio, en religikredo, oni okazigas specialan kurson ĉiumarde kaj vendrede matene antaŭ la laborkomenco. La gvidantoj estas ĉiuj eminentuloj; tri centoj da laboroferantoj fervore aŭskultas kaj la rezultato estas tre bona.

★ Venis la sekva agrabla letero de nia samideano C. C. Cowling, kiu estas profesoro de *Christe College* Hobart, Aŭstralio:

«Kore kaj sincere mi gratulas vin pro la propono eldoni kompletan verkaron de majstro O. Deguĉi. Sendube tia eldonego multe helpos al la interfratiĝo de la homaro.

Nuntempe mi lekcias al universitatoj pri *Oomotismo, Japanujo, Japana Lingvo* laŭ tio, kion mi lernas el «Oomoto Internacia». La studentoj atente aŭskultas kaj tre interesiĝas. Mi ne lekcias, kiel fakulo aŭ klerulo, sed kiel lernanto mem, ĉar mi scias nur iomete pri tiaj aferoj, sed ili scias preskaŭ neniom pri Japanujo, tial eĉ mi povas interesi ilin...»

El la vasta mondo

<i>grandformata</i>	monata eldono
<i>internacia</i>	de
<i>ilustrita</i>	«ESPERANTO
<i>esperanta</i>	POR ĈIUJ»
<i>mondrevuo</i>	

Specimenojn sendas kontraŭ
poŝta respondkupono.

**Eldonejo «Esperanto por ĉiuj»
Warszawa, Polujo, Nowolipki 36**

Estas permesate represi aŭ traduki el O. I. kondiĉe ke oni sendu du ekzemplojn de la presaĵo kaj indiku la devenon.

La Administracio.

Enhavo

Mene Tekel	3	Pesimismo — Optimismo	16
Vortoj de Majstro O. Deguĉi	4	Ideoj tra Esperantujo :	
Universala Homama Asocio :		Pri «mal»	21
Publika letero	6	Defio al la malamikoj de «mal»	22
Respondo al s-ro Follin	7	Japana humoro	23
Religieco en Moudlingvo	8	La japana danĝero	24
Mikado	10	Barbaro en Hindujo	25
Japana Filozofio (4)	11	Japana legendo :	
Filozofio de P vivo	12	La demona masko fiksiĝinta al vizaĝo	27
Kiam la Majstro estis		Japana lingvo por Esperantistoj (24)	28
socialisto kaj ateisto	13	Parolas la legantaro	29
De kristanismo al Oomoto	14	Oomoto Kroniko	32

Anoncoj:

S-ro Teruo Kato (22-jara komizo) ĉe Idemitsu-Syokai, 1-41 Omote-tyo, Taihoku, Formoso, Japauujo — deziras korespondi per L. kaj P. I. Respondo garantiata.

ADRESOJN de esp-istoj kaj de ĉiuj E.-entreprenej, de firmoj kaj hoteloj uzantaj Esp-on, kolektas por sia «BES-Adresaro de esp-istoj el ĉiuj landoj». Ing. Leopold Berger, Potštejn, Ĉeĥoslovakio. Skribu tre legeble la adreson!

Deziras korespondi kun gejunuloj el Manĉukuo, Koreujo, Persujo kaj Egiptujo pri ĉiuj temoj. Respondo certa. S-ro Ragnar Skattum, Bäckhus pr. Halden, Norvegujo.

Japana Vespero. Por baldaŭ okazonta japana vespero mi bezonas japanaŭjojn diversspecajn por aranĝi Ekspozicion. Por belaj sendaĵoj mi rekompencos per bona libro, aŭ lasta Zamenhofa monumentfoto. Sendu al: s-ro Ad. Oberrotman, str. Krochmalua 43/10, Varsovio, Polujo.

Mi korespondas pri diversaj temoj kun samideanoj ekstereŭropaj. Certe respondas. S-ro Avid Persson, Vika St, Svedujo.

Brazila Esperantisto

Oficiala organo de
Brazila Ligo Esperantista
Aperas trifoje en la jaro
Membreco por B. L. E. = 4. — sv. fr
(eksterlande)

Adreso: AV. Marechal Floriano, 212
Rio de Janeiro, Brazilo.

★ **Ni interŝanĝas** reklamon kun tutmondaj Esp.-gazetoj. Bonvolu sendi al ni reklamtekstojn kaj specimenan gazeton. Ni estas ĉiam pretaj por reciproka servo.

La Red. de O. I.

TARIFO DE OOMOTO INTERNACIA

Abonkotizo: (afrankite)

Abonanto: 5 svisaj frankoj, 25 francaj frankoj aŭ ĉiu egalvaloro.

Subtenanto: 20 sv. fr. por 5 jaroj.

Dumviva abonanto: 50 svisaj frankoj.

Reklamo: Tuta paĝo: 30 sv. fr.,
duona paĝo: 15 sv. fr.

Anonceto: 5 linioj = 2 resp.-kup.

Por 6 foja enpresado = kvarobla prezo.

Ĉiu abonanto rajtas enpresigi du senpagajn anoncetojn jare.

Multaj premioj estas dissendataj.

La abonkotizon sendu rekte al Oomoto Centra Oficejo, Kameoka (Kioto-hu) Japanujo.

定價 壹部 貳拾錢 壹ヶ年貳圓四拾錢

昭和九年八月一日印刷 昭和九年八月一日發行

編輯發行印刷人 高木鐵男 京都府南桑田郡龜岡町
荒塚字内九一

印刷發行所 天聲社 (振替大阪75917番) 全

Oomoto-Presejo, Ten'on-kjo, Kameoka

NIAJ REPRESENTANTOJ

Aŭstralio	S-ro L. Thomson, c/R; Rawson, 163 Exhibition str. et. Melbourne.	S-ro Anton A. Ehm, Zittau. Sa., Bahnhofstr. 32.	Jugoslavujo	S-ro Marko Dominis, Split Zrinjska Str. No 1 d.	
Aŭstrujo	D-ro Carl Mimler, Wien VIII, Albertgasse 1-a, S-ro Bernhard Selzer, Etttenreichgasse, 4, 31 Wien X	S-ro Gottlieb Strofner, Munchen S. 50. Bavarujo, Dietramszellestr. 10. 21.	Latvujo	S-ro Karlo Subergs, Riga, Milgravis azera str. 6--1.	
Brazilo	S-ro Majumi Kondo, Caixa postal 3594, S. Paulo.	S-ro K. O. Schmidt, Brixstr. 8 a, Flensburg.	Litovujo	S-ro Andrius Borkauskas, Pakruojaus g. 3. Radviliškis.	
Bulgarujo	S-ro Ivan Kirov, Popska, 484 Sliven. S-ro Georgi Dončev, str. officerska 25, Tirnovo. S-ro Atanas Nikolov, Sevlievo, Burgas.	S-ro F. Bachmann, Bahnhofstr. 3/1. Heilbronn.	Nederlando	F-ino G. de Waart, Box 23, Hilversum.	
Ĉeĥoslovakujo	S-ro Rudolf Burkert, Kalvariengasse 34-IV, Nie- mes. S-ino Sofie Cipera, Plzen III, Zizkova 52.	Hindujo	S-ro Liem Tjong Hie, Semarang, Karangtoeri 66, Java.	Novzelando	F-ino Coralie Smythson, 47A Aurora Terrace, Wellington, C. i.
Francujo	S-ro Simon Frantz, 21, rue Alain Chartier, Paris XV.	Hispanujo	S-ro Francisko Miralles, Hellin (Albacete). S-ro Salvador Viladelmas, Colon 52-54, Sabadell (Bar- celono).	Persujo	S-ro Dariuŝ Nemscöi, Tabriz.
Germanujo	S-ro Kurt Wuensche, Augustenstr. 17, Leipzig-R.	Hungarujo	S-ro Paŭlo Balkanyi, Poŝto 507, Budapest.	Polujo	S-ro Adolf Oberrotman, Varsovio, Krak—Przedm 10 S-ro Denysiuk Les, Dolina, Rachin 20.
		Ĥinujo	S-ro Sh. M. Chun, N.Y.M.S. Lunghuwa, Shanghai.	Svisujo	S-ro Karl Jost, Stolzesstr. 7, Zürich 6.
		Italujo	S-ro Luigi Minnaia, Via del Giglio 16, Roma 115. S-ro Giulio Matuella, Corso Garibaldi 325, Mazzolombardo (Torento).	Usono	S-ro John Lester Lewine, 150 E. 72 nd. St. New York S-ro K. A. Suzuki, Orange Petroleum Co. Ora- nge (Texas)

300 BILDOJN KAJ 1100 TITOLVORTOJN

en densega komposto prezentas al vi la UNUA VOLUMO de

Enciklopedio de Esperanto

sur 272 teksto- kaj 112 bildopaĝoj grandformataj.

La dua volumo ampleksos proksimume 540 paĝojn.

Prezo 30 — frankoj svisaj broŝurita kaj 34 — frankoj svisaj bindita.

Aldonu 10% por sendkostoj.

LA PREZO ESTAS PAGEBLA EN DU EGALAJ PARTOJ

Tuj post pago de la unua duono ni ekspedas la unuan volumon.

Sendu la monon: per bankĉekoj, aŭ poŝtmandatoj al

P. K. O. Krakow, Polujo, Adm. Literatura Mondo, Nro 403. 148
aŭ per internaciaj poŝtaj respondkuponoj. Unu kuponon ni akceptas
en la valoro de 0.30 sv. fr.

**Eldonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj
Budapest, IX, Mester ucca 53, V. 5. Hungarujo**

Mendantoj de tri ekzempleroj ridevas unu senpagan

Novaliĝantoj al Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj rajtas ricevi
ambaŭ volumojn por 14 — sv. fr.

What is Oomoto?

You will be interested to learn something of this growing spiritual movement, originating in Japan and having friends in every part of the world!

Read our English booklet which not only describes the Movement of Oomoto but also provides a wealth of knowledge on questions of Japanese Culture. This book is entirely written by Japanese, so that the contents are not influenced by foreign thought.

A very readable book of 130 pages with many delightful illustrations.

Price: 1 yen for Japan and Manchukuo, 2 Swiss Francs or equivalent for other countries, postage included.

Send direct to,

**Oomoto Headquarters,
Kameoka (Kioto-hu) Japan.**

Monata Heroldo

estas la Esperanto-gazeto por komencantoj kaj por tiuj, kiuj ne povas aboni la semajnan Heroldon. Ĝi enhavas multajn interesajn artikolojn kun multaj bildoj kaj tre malkara. Por la tuta jaro 1934 ĝi kostas nur gmk. 2. — Ĉiu numero estas 10-paĝa en la formato de semajna Heroldo.

Specimeno sendata kontraŭ respondkupono de poŝto aŭ de UEA.

Skribu al:

*Heroldo de Esperanto, Köln,
Brüsseler Strasse 94, Germanujo.*

Jus aperis la senpaciencce jam atendata
11-a eldono de

BES — Adresaro

de esperantistoj el ĉiuj landoj

kun pli ol 1000 adresoj kaj preskaŭ 100 portretoj de E-istoj el pli ol 40 landoj kun detala registro de aliĝintoj laŭ profesio, inklinoj kaj fakoj tiel ke ĉiu tuj trovas la deziratan adreson. — Tiu ĉi belaspekta, modele aranĝita broŝuro, kiu enhavas kun bilda, registra kaj anonca parto 110 paĝojn, estas bezonega kaj unika helpilo por ĉiu esperantisto kaj kostas 1 Fsv aŭ egalvaloron. — Mendu kun samtempa pago,

Ĉe P eldonanto

BES / Boh. E-Servo /, POTŠTEJN
Ĉeĥoslovakujo

Aliĝoj por la nova, 12-a eldono, estas jam akceptataj. Aliĝa kotizo kun senpaga adresaro: 1 Fsv; publikigo de portreto: 0.50 Fsv. — Ĉiu 10-a aliĝinto ricevos premion en la valoro de 1, ĝis 25 Fsv. — Postulu senpagan, 12-paĝan, ilustritan, detalan prospekton.

